



**ESPERANTO**

**JULIO/AŬG. 1961**



# esperanto

JUL. / AŬG. 1961

5 4 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 668-9 (7-8)

Fondito : H. HODLER

**Cion por la redakcio** oni sendu al la Redaktoro : W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannanshire), Skotlando.

**Cion pri administrado de UEA** kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono : (010) 128313. Ĝirkonto : 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

**Ĉiu materialo por difinita numero** devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

**Bankisto de U.E.A. :**

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

**Traduko kaj represo** de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

**Jara abono (1961) :** 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

**Tarifo por reklamoj :**

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

**Anoncetoj pri korespondado :**

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

**Legantoj en 80 landoj.**

**Estraro de U.E.A. :**

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

**Centro de Esploro kaj Dokumentado**

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

**Serva Centro :** ĉe Mag. Bruno Keppeler, 18, rue St. Léger, Genève, Svislando (provizora adreso).

## LA FRONTPAĜA BILDO :

La bela Lago Ranoŝ, tipe skota montara pejzaĝo.

## Enhavo

|                                              |     |
|----------------------------------------------|-----|
| Sub la aŭspicio de la muzoj . . . . .        | 121 |
| Taskoj de la monato . . . . .                | 121 |
| Rolo de la Fakaj Organizaĵoj . . . . .       | 122 |
| Kampejo "Esperantujo" en Adriatiko . . . . . | 123 |
| Waringhien sesdekjara . . . . .              | 124 |
| El verkoj de Gaston Waringhien . . . . .     | 125 |
| Post la kulisoj . . . . .                    | 126 |
| Pri la farso de Advokato Patleno . . . . .   | 128 |
| La Informa Laboro en la jaro 1960 . . . . .  | 131 |
| Esperantologio II/2 aperos . . . . .         | 136 |

## Rubrikoj

|                                    |     |
|------------------------------------|-----|
| Novaj libroj . . . . .             | 129 |
| Nia forumo . . . . .               | 130 |
| La Juna Vivo . . . . .             | 134 |
| La internaciaj konkursoj . . . . . | 136 |
| Tra la mondo . . . . .             | 137 |
| 46a U.K. . . . .                   | 138 |
| Oficiala Informilo . . . . .       | 139 |

**Manuskriptoj** por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

**OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

# SUB LA AUSPICIO DE LA MUZOJ

Por la amantoj de belaj artoj la nomoj de Cocteau kaj de Sartre estas frandaĵo: grandan meriton havas la Internacia Arta Teatro, kiu en Harrogate ludos ilin por la unua fojo en Esperanto (respektive, "La Homa voĉo" kaj "La respektinda p. . ."). Kune kun verko de M. Boulton, la tuto formos nur unu el kvar teatraj spektakloj de la Arta Festivalo. La aliaj tri estos la humurplena mezepoka franca farso "Advokato Patleno", ankaŭ prezentota de IAT, la "Urso" de Ĉeĥov, surscenigota de Bristola Trupo, kaj la japana dramo "Okuni kaj Gohei", ludota de kuraĝaj gejunuloj el Londono. Flanke de ili, la kongresanoj ĝuos tri muzikajn programojn. La unua estos koncerto nomata "Mediterraneo kantas", dum kiu la Junulara Ĥoro el Ljubljana (40 ludantoj) kantos en Esperanto hispanajn, francajn, italajn, dalmatajn, grekajn, turkajn kaj israelajn kanzonojn; estas atendata ankaŭ la partopreno de la konata "Kvarteto Beltono" de Radio-Varsovio. La dua muzika programo estos amatora spektaklo sub la titolo "Arto kaj Vivo", kun originala muzika teatraĵo "El la pasia vivo de Franz Liszt", dum la tria estos prezentado de folkloraj jugoslavaj dancoj fare de la ensemble "Branko Cvetković" (39 ludantoj). Du dancvesperoj kaj regala akcepto flanke de la Urbestro de Harrogate, kronos la festajn aranĝojn.

En la kampo de la plastikaj kaj figuraj artoj, malgraŭ tio, ke la anoncita ekspozicio estas nuligita, la pentristo Lo Martire, kiu jam ekspoziciis en la Varsovia Kongreso, anoncas personan pentraĵ-elmontiron. Aliaj elmontroj pri fotografiaĵoj kaj propagandaj afiŝoj estas viziteblaj en la kongresejo, kaj speciala Ekspozicio de Esperanto-Literaturo por brita publiko okazos en la Biblioteko de Harrogate.

Tiu estas, grandlinie, la skemo de la Arta Festivalo, al kiu kunligiĝas la prelegoj de I.S.U., la tradiciaj Belarta kaj Oratora Konkursoj kaj la novaj sonbenda kaj deklamada konkursoj ("Horeto de Poezio").

Se oni aldonas la 27 fakajn kunvenojn, la 6-an Infanan Kongreseton, la 31-an Blindulan Kongreson, la Cseh-Seminarion, la kunvenojn de la Akademio, la aliajn kunvenojn, filmprojekciojn, ekskursojn kaj vizitojn (eĉ speleologia esploro de kaverno en Jorkŝiro!), oni povas konstati, ke la nunjara Kongreso - kvankam nur pala respegulo de la artaj aplikoj de Esperanto - laŭ nombro da programoj kaj nivelo de aranĝoj superos eĉ tiujn rekordojn, kiuj ŝajnis nesupereblaj.

Se, krome, oni konsideras, ke la Universala Kongreso kaj la Arta Festivalo estas unu morala tuto kun la Antaŭkongreso kaj Seminario "Oriento-Okcidento" en Londono, 17-a Junulara Kongreso en Wokingham, Geografia Semajno en Leicester kaj Postkongreso en Skotlando, oni ne povas ne esti impresitaj de la proporcioj kaj potencialaj fortoj de nia manifestacio, kaj de ĝia kreskanta signifo en la internacia vivo.

La spektaklo de miloj da kongresanoj, kiuj - ne renegante la naciajn lingvojn en la kadro de la nacia teritorio - sentas sin integritaj en tutmonda spirito per komuna lingvo, hodiaŭ plu ne estas nova. Pli ol eksperimento, la Arta Semajno en Harrogate estas repruvo de konata fenomeno. La kongresanoj el plej diversaj landoj kaj kontinentoj, kiuj, aŭskultante en la sama lingvo teatraĵon aŭ voĉan koncerton, priartan disertacion aŭ literaturan komenton, perceptos la samajn emociojn kaj intuicios la samajn verojn, formos unu fojon plie modelon de tutmonda respubliko, prototipon de morgaŭa homaro.

G. C. FIGHIERA

*Noto: la verbo "renegi" estas uzata en la senco de la radiko devenanta de la Zamenhofa vorto "renegato".*

## TASKOJ DE LA MONATO

Antaŭ nelonge mi parolis kun esperantisto - multjara sindona laboranto en loka grupo - kiu en la konversacio menciis, ke ofte li rememoras pri io farenda, sed poste forgesas plenumi tiun taskon. Verŝajne ĉie tra la mondo troviĝas unuopuloj simile bonintencaj, sed forgesemaj. Verŝajne ankaŭ okazas, ke la funkciuloj aŭ eĉ tutaj komitatoj de lokaj grupoj pretervidas konkretajn eblecojn de agado.

Estas tute certe, ke ne ĉiuj el la ĉ. 1.500 Esperanto-grupoj en la mondo kaj la dekmiloj da esperantistoj estas pretaj efektive ion fari aŭ iom kontribui por antaŭenigo de la Internacia Lingvo. Sed estas ankaŭ tute certe, ke la plimulto de la lokaj grupoj kaj relative tre granda nombro da unuopuloj volonte donas sian helpon, se ili estas ĝustatempe atentigitaj. Por helpi al tiuj bonvolaj organizaĵoj kaj unuopuloj la revuo "Esperanto" enkondukas novan rubrikon sub la titolo "Taskoj de la Monato".

Tiu rubriko aperos laŭ la ebleco en ĉiu numero de la revuo kaj ĝi konsistos el tute koncizaj konsiloj kion fari en la koncerna monato. La konsiloj rilatos aŭ al rutinaj taskoj, aŭ al specialaj laboroj en la kadro de iu grava monde planita, organizita kaj plenumenda klopodo. La Estraro de U.E.A. kaj la Redakcio de "Esperanto" esperas, ke tiu ĉi nova rubriko estos atente legata kaj observata de multaj Esperanto-organizaĵoj, speciale de la lokaj grupoj, kaj de kreskanta nombro da individuoj.

Jen la unua, tute mallonga listo de la taskoj de tiu ĉi monato:

1. Por unuopuloj: pagi tuj sian kotizon de individua membro al U.E.A. (se oni tion ankoraŭ ne faris), varbi almenaŭ unu plian individuan membron aŭ kontribui por la "Fondaĵo Canuto", el kiu la Centra Oficejo de U.E.A. membrigas al U.E.A. esperantistojn en landoj, el kiuj oni ne povas pagi la kotizon.

2. Por la lokaj grupoj: Prepari la propagandon (afiŝoj, flugfolioj, sciigoj k.s.) por la aŭtunaj kursoj; organizi en aŭtuno almenaŭ unu kurson por komencantoj kaj unu por progresintoj; plani la ĉiusemajnan programon por la grupaj kunvenoj en aŭtuno.

3. Por la landaj organizaĵoj: plani tutlandan kampanjon por la aŭtunaj kursoj; fondi novajn lokajn grupojn en ĉiu urbo, kie troviĝas eĉ nur 4-5 esperantistoj; komisi kompetentan personon, laŭ ebleco ĵurnaliston, raporti pri la U.K. al la landa presagentejo kaj al la ĉefaj taggazetoj jam el Harrogate.

4. Por ĉiu kongresano: aranĝi anticipe sian tempon tiel, ke oni povu partopreni almenaŭ unu laboran kunsidon de la Kongreso.

I.L.



# ROLO DE LA FAKAJ ORGANIZAĴOJ

Unu el la karakterizaj trajtoj de Esperanto estas ĝia rimarkinda *vivanteco*. Eĉ la kontraŭuloj de la Internacia Lingvo ne povas nei la fakton, ke ĝi posedas internan vivojesan forton, kiu permesis al ĝi travivi du mondmilitojn, plurajn revoluciojn kaj sociajn perturbojn kaj eliri el ĉi ĉio ankoraŭ pli plifortigita. Ja multaj belaj ideoj ne eltenis la vivekzamenon kaj neniigis. Ankaŭ multegaj projektoj de internacia lingvo (da ili estis pli ol 800 !) malaperis sub la premo da la vivo. Nur fortaj ideoj, havantaj profundajn radikojn en la socio, povas rezisti kontraŭ la uragana kuro de la historio. Tia forta ideo montriĝis la Internacia Lingvo.

El kia fonto ĉerpas la lingvo sian mirindan vivo-  
forton ?

La *vivanteco* de la lingvo fontas el ĝiaj internaj valoroj kiel esprimilo de niaj sentoj kaj ideoj, el ĝia kreskanta literaturo, el ĝia organika ligiteco al la progresivaj ideoj de nia jarcento. Sed ne lastan rolon en la stabiliĝo de la lingvo ludas la organizaj formoj de la Esperanto movado. Dum jardekoj estis ellaborita organizaĵo celkonscia, elprovita kaj daŭre perfektigata. Malmultaj estas la organizaĵoj kiuj havas tian perfektan kaj konstante perfektigantan mondiskalan organizon kiel nia movado. Universalaj kaj landaj asocioj, societoj, kluboj, disbranĉita reto de delegitoj, presitaj ligiloj en formo de gazetoj kaj revuo, eldonejoj de libroj, fakaj, landaj kaj universalaj kongresoj, multaj fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj k.t.p.

Unu el la plej junaj, sed ankaŭ plejmultpromesaj branĉoj de la Esperanta movado estas la fakaj asocioj. La plejmulto el ili fondiĝis post la dua mondmilito. Ekz. la organizaĵo de fervojistoj fondiĝis en 1948, de instruistoj en 1949, de geografoj - 1955, de juristoj - 1957, de arkitektoj - 1959 k.s. Eĉ la plej malnova faka asocio TEKA (fondita en 1908) reorganiziĝis en la lastaj jaroj sub la nomo UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio). Estas ankaŭ organizitaj la verkistoj, ĵurnalistoj, poligrafoj, ŝakistoj. La elektrikistoj kaj filmistoj estas en stadio de organiziĝo.

Apenaŭ estas eble trotaksi la valoron de fakaj organizaĵoj por nia movado. Ili donas al siaj membroj la eblon ligi la idean *poresperantan* agadon por komuna celo kun peresperanta laboro por praktika individua utilo. Ja la celo de ĉiuj fakasocioj

estas disvastigi fakajn konojn inter la samprofesiaj, kunordigi la individuan laboron de specialistoj. Jen la praktika flanko de la afero ! Aliflanke la eldono de faka terminaro, faka gazetaro kaj faka literaturo grave kontribuas al la pliriĉigo de la Internacia Lingvo kaj al ĝia altirforto laŭ utilisma vidpunkto.

La organiziĝo laŭ faka principo havas en nia movado grandajn perspektivojn kaj multflankajn eblecojn. Tamen nur malmultaj fakoj havas sian organizaĵon, la plejmulto de fakuloj ne estas ankoraŭ organizita. Oni ofte argumentas, ke estas malmulte da samfakanoj-esperantistoj por starigi apartan asocion. Tiu argumento en plej multaj okazoj ne estas ĝusta. Ja sufiĉas nur kelkmembra fakanaro eĉ loze organizita, por formi la embrian ĉelon por forta faka organizaĵo. Oni konsideru ankaŭ la konstatitan fakton, ke organizita fakgrupo (eĉ malgranda) helpas al la esperantiĝo de samfakanoj kaj sekve al ĝia kresko. Kiel modelo servu la Internacia Federacio Esperantista Fervojista kiu komencis tre modeste, sed kies membraro kreskas nun de jar-al-jaro, kiu eldonas en multaj landoj fakgazetojn kaj organizas eĉ sian jaran internacian kongreson. Ne atendu, sed organiziĝu laŭ via fako, kontaktu tiucele kun samfakanoj ! La fakdelegitoj de UEA povas multe kontribui al la fondiĝo de novaj fakorganizaĵoj tie, kie la cirkonstancoj maturas jam por tiu celo.

Dum sia printempa kunsido la Estraro de UEA decidis, ke la unua Generala Kunveno dum la UK en Harrogate estu dediĉita al pritrakto de la lastatempaj atingajoj de la landaj kaj fakaj organizaĵoj. La praktiko montris, ke ekzistas multaj novaj formoj de efika laboro kaj informado, aplikataj kun bonaj rezultoj flanke de kelkaj asocioj, sed nekonataj al la plimulto de esperantaj organizaĵoj. Por forigi tiun mankon en Harrogate estos diskutataj la plej novaj kaj taŭgaj rimedoj, aplikendaj por disvastigo de nia lingvo. Tia diskuto devas esti zorge antaŭpreparita, tial ĉiu asocio komisiis al unu el siaj membroj prezenti ĝiajn lastatempajn atingajojn. Ni kredas, ke tia reciproka intersanĝo de spertoj utilos al la movado ĝenerale kaj al ĉiu asocio aparte.

**Andreo Rajski**



# Ekfunkciis Kampadejo „Esperantujo” en Adriatiko


La titolo de ĉi tiu artikolo vekos certe tuj ĉe la legant(in)o kunligitecon kun la jam bone konata luksa broŝuro "Totala sun-eklipso", kun la grupo de jam popularaj junaj astronomoj-esperantistoj de la Astronomia observatorio en Zagreb, kun ilia verko — sensacia libro "Tragedio en la Universo", tradukita de nia meritplena majstro de E-tradukarto ak. Ivo Rotkvić, kaj kun aliaj iliaj planoj. Pri la menciitaj temoj jam skribis kaj la Esperanta kaj la nacilingva gazetaro.

Unu el la taskoj kiujn ili surdorsigis estas la fondo de somerlibertempejo "Esperantujo" en idilia dalmatia urbeto Primošten, kuŝanta mezvoje inter la konataj marbordaj urboj Šibenik kaj Split (ĉi lasta lanĉis la polan ŝipon "Zamenhof"). Nun, dum la someraj monatoj, la somermado estas por ĉiu homo en la mondo la plej aktuala temo de interparoloj. Same por la esperantistoj. Tial ankaŭ mi diru kelkajn vortojn pri nia novnaskita esperantista somerrestadejo "Esperantujo". (Malnovaj esperantistoj certe tuj memoris la insulon "Esperanto", kiun antaŭ la dua mondmilito la komunumo en la apuddanuba bulgara urbeto Rahovo cedis al la tiea E-grupo por kulturi ĝin kaj aranĝi plaĝon).

La sciigo, ke la aktivuloj de la ĉeobservatoria E-grupo helpe de la Kroatia Esperanto-Ligo kaj la Turista societo Primošten, kaj sub aŭspicioj de la Jugoslavia Esperanto-Ligo, fondas malmultekostan libertempejon ĉe la bordo de la "lazura Adriatiko", vekis ja ne mirige evidentan ĝojon inter la vastaj rondoj esperantistaj en ĉiuj eŭropaj landoj, ĉiam sopirantaj pri la fondiĝo de la vere esperantista familia ĉemara somerrenkontiĝejo. Tion pravas centoj da leteroj kiujn la Astronomia observatorio (Zagreb, Opatička 22, Jugoslavio) ricevis dum la lastaj monatoj kaj pli ol 200 unuopaj aŭ grupaj aliĝoj por ĉi tiu jaro.

Kiam vi, kara leganto, legos ĉi tion, sciu, ke pluraj viaj s-anoj jam ĝuis aŭ dum vi legas ĝuas la unuajn fruktojn en "Esperantujo". Kio altiris ilin tiel rapide decidiĝi viziti Primošten? Ĉu la belaj de la naturo kiun ili povis nur priflari foliumante la broŝuron "Totala suneklipso", ĉu la originaleco de la ideo mem, ĉu la familia agordo, ĉu eksterordinare modera turist-elspezoj, ĉu la ĉi jara fundamenta ŝanĝiĝo de la kurzo de jugoslavia dinaro favore al eksterlandaj turistoj (pasintjare por unu usona dolaro la turista ricevis 400, nun li ricevas 600 dinarojn)? Verŝajne ĉio kune influis iliajn decidojn! Sendube la financa momento ludas la decidan rolon. Estas ja evidente granda diferenco inter 1,50 dolaroj, kiom kostas pensiono por la entenda libertempanto aŭ 1,83 dol. por la endoma kaj 3 ĝis 8 dolaroj kiom kostas la taga pensiono en la aliaj marlokoj.

Kaj nun ion pri la ideo, kiu ne plu estas ideo, sed realaĵo. En romantika pinarbareto tuj apud la rando de la margolfo (sageto montras ĝin sur nia elara bildo farita antaŭ pluraj jaroj!) kuŝas dupersonaj tendoj, similaj al etaj, intimaj dometoj. Ĉiu tendo posedas ligno-plankon, 2



litojn kun matracoj kaj ŝranketon. En la kampadejo estas la akvokondukilo, komuna manĝejo, perfektaj sanitariaj instalaĵoj kaj entendara vendejo de ĉiutage necesaj artikloj kaj E-libroj. Ekzistas ankaŭ somerumantoj kiuj alportis kun si proprajn tendojn (ili pagas nur la ĝeneralan turistan krompagon: egalvaloron de 0,14 dolaroj por la tagnokta restado).

Plezuroj kiujn la somerumantoj ĝuas estas multnombraj: fiŝkaptado, velŝipado al romantikaj najbaraj insuloj (unu el ili oni baptis "Insuleto de la amo"!), ĉiuvespere danco kaj kantado, perboataj ekskursoj al proksimaj famaj akvofalegoj de la rivero Krka. La junaj astronomoj-esperantistoj alportis ankaŭ modernan astronomian teleskopon por observi la kristalan firmamenton. Ne mankas ŝercaj distroj: vetnaĝadoj sur pordormaj aerkusenoj, internacia vetkuro de la azenrajdantoj ktp.

Se ankaŭ vin kaptis la emo aliĝi al la "Esperantujo", vi atendas ankaŭ konsilojn pri trafika atingeblo. Jen tiaj konsiloj en unu frazo: Al Primošten oni povas alveni *vagonare* per la fervojlinio Zagreb-Šibenik (la urbo Šibenik estas la ĉefa celtacio por atingi Primošten), *ŝipe* pere de linio Rijeka (Fiume)-Šibenik aŭ Triesto-Šibenik, *aviadile* pere de linio Zagreb-Split, *aŭtobuse* pere de linio Zagreb-Šibenik kaj *aŭtomobile* pere de Adriatika magistralo iranta de Rijeka laŭlonge de la romantika marbordo ĝis "Biograd na moru" (cento da kilometroj antaŭ Primošten) kaj poste per la ŝtatoŝoseo. La loka ŝipo Šibenik-Primošten trafikis nur unu fojon ĉiutage escepte la dimanĉon (foriro je la 13,30, alveno 15,45). Por la veturontoj tre utilaj estos informoj donitaj en la nova 12-paĝa broŝureto, kiun eldonis la aranĝintoj.

Se oni jam estas en la lando, tiam oni utiligas la okazon por viziti la mondfamajn naturbelaĵojn kaj vidindaĵojn (milinsula Adriatika maro, alpecaj regionoj, Plitvice-lagoj, grotego en Postojna ktp.), kiujn ĉiujare vizitas unu miliono da fremdaj turistoj.

Dum miaj oftaj vizitoj al la kovejo de grandaj ideoj, la "Kroata naturscienca societo" (Ilica 16/III), kie oficas la ĉefaj movigantoj de la afero tre komplezemaĵoj gesanoj D-ro Gabriel Divjanoviĉ, ak. Ivo Rotkvić, Cica Hadjibaŝĉauŝeviĉ kaj Ivka Štefankoviĉ, kaj al "La observatorio" (Opatička 22) en Zagreb, kie tagnokte bolas la poresperanta laboro kiel en la formikejo, mi ricevas impreson, ke ĉi tiu esperantista realiĝo estas nur komenco de la ankoraŭ pli ampleksa amplene plenumota plano: ĉi jaran somerumejon en sekvontaj jaroj plivastigi per konstruo de *weekend*-dometoj anstataŭ tendoj, per organizo de seminarioj, somera universitato, per alporto de amatora radiostacio kiun posedas la observatorio en "Esperantujo".

Kaj je la fino unu deziro: la somerumejo "Esperantujo" ne estu nur la propraĵo de la junaj astronomoj-esperantistoj sed la tutesperantista kampadejo, renkontiĝejo de ĉiuj verdstelanoj, kiuj apogu la perspektivan aferon per sia vizito, kaj sentu sin tie kiel en la propra hejmo.

**Marinko Gjivoje**





# Waringhien

## sesdekjara

La 29a de julio 1961 estas la 60-jara datreveno de la naskiĝo de Prof. Gaston Waringhien. Ĝusta momento por ekpensi pri la grandaj atingoj de tiu konata esperantisto; kaj efektive, la ekpenso estas iom konsterna. Kiom el la vere fundamentaj verkoj de la esperantismo ni ŝuldas al lia plumo! — *"Plena vortaro"*, la sola aŭtoritata esperantlingva vortaro, kvankam aliaj multe kontribuis al ĝi, estas senĉese gvidata de li; *"Plena gramatiko"*, unika analizo de la zamenhofa lingvaĵo, realiĝis per li en kunlaboro kun Kalocsay; en *"Leteroj de L. L. Zamenhof"* li ne nur kolektis sed ankaŭ revelacie komentariis grandan kolekton de gravaj leteroj-dokumentoj; kaj lastatempe, en la kolekto *"Lingvo kaj vivo"* li pridonacis nin je neelĉerpebla materialo por la propagando kaj kompreno de nia vivanta esprimilo! Kvar verkoj, veraj kolonoj de la kara afero: se nur tion li estus doninta, nia ŝuldo al li estus jam nerepagebla.

Ĉu dokta pedantulo, ĉu sekmiena fosesploranto kun emo malvarme sekci kaj fridsange reguligi? Ja ne: "Kiam li dokumentas, li dokumentas kun scienca ekzakto, kaj kiam li entuziasmas, li ĝin faras fortike el la konstatoj de cerbo kaj estetika sento. Gravan temon li scias trakti elaste, eĉ ride-tante, kaj kiam petola humoro lin kaptas, li pruvigas, ke kobolda sprito ne malakordas kun la digno de Akademiano". Kiu lin konas, tiu konas majstran rakontemulon; kiu legas la *Nican Literaturan Revuon*, tiu scias, ke elitaj ŝercoj trovas sian lokon sur ĝiaj paĝoj apud la plej seriozaj poeziaĵoj — kompreneble tiuj ŝercoj spegulas la trafan guston de la Nica redaktoro, Prof. Waringhien!

Sed nia klera vortaristo kaj zamenhofologo estas ankaŭ poeto — multe tro modeste li taksas sin tiurilate, sed aliaj poetoj, kaj klarvidaj legantoj, rekonas lian elstaran talenton — kaj la beletro estas tiel same lia reĝlando kiel la lingvistiko. Ankaŭ sur tiu kampo, kompreneble, lia analiza kaj registra menso faris sian laboron, kaj en *"Parnasa Gvidlibro"* (denove kunlaboro kun Kalocsay) li jam en 1932 prezentis skematon pri la ekzistanta

prozodio de Esperanto. (Ne li, sed alia franco — Raymond Schwartz — atentigis, ke la dio de la poezio estas: prozo-dio; sed tion nur flanke). Ĉi-tie, kiel ankaŭ aliloke, li dankinde sin detenis de la teorumado kaj atentis tion, kion fakte faris la poetoj. Kaj plue praktike, li multe tradukis poemojn. Pri lia volumo *"Poemoj de Omar Kajam"* (1953) skribis franca kajamisto Armand Robin en *La Nouvelle Revue Française* de 1-a de novembro 1958: "Ekzistas kelkaj centoj da tradukoj de *l'Quatrains* en la diversaj lingvoj de la planedo... La plej ekzakta, kiun mi konas, estas tiu en Esperanto publikigita de Gaston Waringhien..." Jen vere objektiva takso pri lia nivelo! Poste li kunredaktis kaj kuntradukantis la majstran tradukon el Baudelaire: *"La floroj de l'Malbono"*, pri kiu la redaktoro de konata hispanlingva kulturrevu skribis proksimume: "Ĝis nun mi opiniis nebla la tradukadon de Baudelaire; nun mi konstatas, ke mi eraris". Tiaj laŭdoj de kompetentuloj ekster la movado estas por nia afero tre valoraj; nur dank' al la elstara talento de Waringhien ili estis atingitaj ĉifoje.

Vortaristo, gramatikisto, editoro, poeto, redaktoro — kio ankoraŭ? Nu jes, eseisto, kompreneble; krom la jam menciita *"Lingvo kaj vivo"*, li jam eldonis la gravan kolekton *"Eseoj I: Beletro"*, pionira verkaro, kiu estas samtempe apogea atingoj kaj plenumo. Li ankaŭ verkis franclingvan lernolibron, kiu estas "versajne la plej bona eksponilo de nia lingvo": *A.B.C. de l'Espéranto à l'usage de ceux qui aiment les lettres*; "versajne la plej ampleksan el ĉiuj niaj nacilingvaj vortaroj": *Esperanta-Franca Vortaro*; la "bonegan, represendan" *"Facilaj Esperantaj Legaĵoj"*; dulingvan eldonon de la *"Maksimoj de la Rochefoucauld"*; — sed jam la amplekso de lia verkaro devigas al simpla listigo de titoloj.

Per kio en la estonteco lia plumo dotos nin? Nu, atendas sian eldoniĝon jam dua kompleta poemaro, ĉifoje de Heine, kiun pretigis tiu "ora duopo" W. kaj K. Kaj li pasigas longajn horojn super la delonge atendita kaj nepre necesa, sopirata *Plena Ilustrita Vortaro*. Kaj ni ne dubas, ke ankoraŭ ofte nia senlaca Akademiano surprizos kaj ĝojigos nin per la riĉo de "lia bonhumoro, inteligento, klero kaj sprito, radiantaj al ni el la bukedo de ĉiam sorĉe interesaj kaj grandiozaj verkoj."



# El verkoj de Gaston Waringhien

*Venu, amik' ! La zorgon pri morgaŭ ni forŝiros.  
Jam gajno estas, kiom da vivo ni akiros.  
Morgaŭ, kiam ni lasos kadukan ĉi gastejon,  
kun sepmil jarojn oldaj migrantoj ni vojiros...*

●

*Se eble, havi bulon da purtritika pano,  
ŝafidan kruron, kruĉon da vino ĉe la mano,  
kaj sidi ambaŭ en la soleco de l' Ruinoj —  
viv', kiun ĝui povas ne ĉiu ajn sultano !*

●

*Kiam en tomb' de miaj esperoj Sort' min tretos,  
kaj min, senplumigitan birdeton, Mort' forĵetos,  
zorgu : el mia cindro vi faru nur pokalon !  
Eble, kiam ĝi plenos de vin', mi revivetos...*

●

*Kiam printempa nubo rosumas sur tulipoj,  
staru kaj levu glason al viaj rondaj lipoj :  
ĉar tiu ĉi verdaĵo, hodiaŭ okul-festo,  
kreskos el viaj morgaŭ forpolviĝontaj ripoj....  
(el "Poemoj de Omar Kajam")*

● ●

Imagu botanikiston, kiu ekrimarkus en la parkoj de sia urbo tute novan specion de vegetaĵo, nenie ĝis nun viditan nek klasifikitan; imagu zoologon, kiu malkovrus en la akvo de sia patruja rivero multigon de fiŝvariaĵo ankoraŭ konata kaj priskribita de neniuj el liaj kolegoj. Kaj se vi vidus ilin, post la unua rigardo, rektiĝi kun indiferenta mieno kaj serene daŭrigi sian paŝadon al "pli seriozaj aferoj", ĉu vi opinius ilin fidindaj kaj konsciencaj sciencistoj ? Tia tamen estas la konstanta sinteno de niaj lingvistoj.

Kelkaj el ili, konfesinde, de tempo al tempo konsentas diri kelkajn vortojn pri la "artefaritaj lingvoj", pri la dezirindeco de internacia komunikilo — sed ili tuj aldonas, ke tiucelaj esploroj ankoraŭ ne estas komencitaj de kompetentaj personoj, ke cetere ili postulos centon da jaroj por atingi la "perfektan, idealan" solvon, taŭgan por ĉio kaj superan al ĉio, ĉar halti ĉi-flanke de la perfekteco estus krimo kontraŭ la kulturo; niaj aŭguroj eĉ konsentas konfidi, tre modeste, ke pri tiu ideala solvo ili havas jam kelkan ideeton : la unu insistas, ke ekzistu genitivo por konformiĝo al la angla kaj germanaj lingvoj; la alia, ke devas ekzisti nek kazoj, nek nombroj, same kiel en la ĉina; la tria, ke precipe oni forigu la infinitivon, ĉar tiu modo malaperis el la novgreka kaj el la novaraba ktp. Sed agi tiel, kiel postulas la plej simpla scienca honesteco, sed funde studi la aferon antaŭ ol paroli pri ĝi, sed trakti Esperanton same kiel ĉian alian lingvon, t.e. ne elmeti juĝon kaj konkludojn pri ĝi tiel longe, dum oni ne praktikis kaj plene mastris ĝin — jen kion, krom la honorinda escepto de Profesoro Collinder ĉe la Uppsala Universitato kaj de Profesoro Collinson el la Liverpola, ili kredas sin rajtigataj ne fari.

(el "Lingvo kaj vivo")

La dua regulo de la tradukarto estos tiel paradoksa, kiel la unua : povoscii Esperanton. Scii ne nur la signifon de la vortoj, sed ankaŭ la regulojn de la gramatiko kaj la kutimojn de la lingvo — ĉion, kion oni povas lerni nur per ĉiutaga manipulo de la verkoj de Zamenhof, kaj de la du libroj, en kiuj estas sisteme prezentita lia lingvouzo : la *Plena Vortaro* kaj la *Plena Gramatiko*. Kvankam ni partoprenis en ilia kompilado kaj redaktado, mi ne tial opinias min senrajtigita aŭ senaŭtoritata por akcenti, ke tiuj du repertuaroj estas la ne malhaveblaj avertiloj kontraŭ la konstanta danĝero sklave imiti la naciajn idiotismojn kaj transporti ilin en nian sennacian lingvon. Bona tradukanto estas kvazaŭ orlavisto, kiu zorge purigas ĉiun multekostan gruzeron je ĝia kruda tego, gardante nur la oron de la penso. Sed, ho ve ! svarmas la aventuristoj kaj la nespertuloj. Kiel diris tiu maljuna aktoraĉo al publikulino renkontita, unu nokton, sur benko de la Champs-Élysées : "Belaj profesioj estas la niaj, fraŭlino ! Sed fuŝitaj de la konkurenco de la amatoroj !" Kiom da bonaj esperantistoj mi vidis, kies stilo estas senmakula kaj eleganta en iliaj originalaĵoj, sed kiuj stumblas kaj konfuziĝas, tuj de kiam ili devas esperantigi nacian tekston ! Kiom da vort- aŭ frazeraroj mi kolektis el la tradukliteraturo, kiujn ni ŝuldas al la influo de la fremdaj lingvoj ! Ĉu estus utile memorigi al tiu hispano, ke *altano* ne signifas *monteto*; al tiu *svedo*, ke *skandalo* ne signifas *kriaĉo*; al tiu nederlandano, ke *komoda* ne signifas *oportuna*; al tiu anglo, ke *oleo* estas nek *petrolo*, nek *benzino*; al tiu germano, ke *koncepto* estas nek *malneto*, nek *koncipiĝo*; al tiu franco, ke *servi* estas nek *surmeti* (manĝon) nek *sin servi*, *uzi*; al tiu ĉeĥo, ke *honorario* ne montras eminentularon; al tiu hungaro, ke "oficiro en la mano kun libro" esprimas, ke la koncernato tenas, krom libro, oficiron en sia mano, tre neoportuna pozicio, kaj malmulte konvena al la prestiĝo de la armeo, kiu postulus tute prave ian pli respektan "oficiro kun libro en la mano"; al tiu alia anglo, ke "Aero libera !" estas unu el la elementaj rajtoj de ĉiu estaĵo, kaj ke celkonscia garaĝisto certe preferus, kiel reklamilon, la ĝustan "Senpaga pumpado !"; al tiu alia hispano, ke "la taŭro partoprenis la triumfon, trinkante en ĝia nomo la bubo, kiu ĝin vartis" ŝajnas esti nur kazo de sisterora akuzativo kaj iel aludi al ia trinkebla speco de bubo, multe pli malofta, verdire, ol la trinkebla.... ? Sed senombraj estus la citindaĵoj, ĉar malforta estas la karno, kaj pekema ĉiu plumo. Inkujo estas neelĉerpebla fonto de nigraj agoj... Kiu neniam kulpis, tiu leviĝu !

Jen kial stariginda estas la korolaro al la dua regulo : **Neniam publikigu tradukon, eĉ deklinian, kiun vi ne kontroligis per klera alilingva esperantisto !**

(El "Eseoj I : BELETRO")

## ● ● EKZOTA PARFUMO

*Se okulferme, en varma vespero de aŭtuno,  
Enspiras mi parfumon de via brust' fervora,  
Jen antaŭ mi sterniĝas feliĉa lando fora  
Kiun blindigas fajroj de monotona suno.*

*Pigra insul' ĝi estas, dotita de l'Fortuno  
Per strangaspektaj arboj kun frukto dolĉodora,  
Per viroj kun fortika kaj svelta korp' kolora,  
Virinoj kun mirinde sincera okulumo.*

*Via parfum' min gvidas al ravaj landoj varmaj :  
Jen la haveno, plena de mastoj, veloj svarmaj,  
Ankoraŭ tute lacaj de skuoj de l' mar-ondo.*

*Kaj laodoro verda de l' tamarisk', akanto,  
Tra la aer' ŝvebante, ŝvelante en vasta rondo,  
Miksiĝas en l'animo kun la marista kanto.*

(el "La floroj de l' malbono")



# Post la kulisoj

*Lastatempe aperis en nia rubriko "Nia Forumo" pluraj leteroj pritraktantaj la eldonproblemon — kaj la aĉetproblemon — de la esperantistoj. Ni pensas, ke povas interesi al niaj legantoj ekrigardo malantaŭ la kulisojn de niaj eldonejoj, kaj tial ni represas ĉi-sube du leterojn interŝanĝitajn de unu nia verkisto, Karolo Piĉ, kaj unu nia eldonisto, J. Régulo. Laŭ nia opinio, ili multe prilumos la supre menciitan diskuton.*



Litomislio, la 4-an de marto 1961.

Tre estimata s-ro doktoro, kun ĝojo mi ricevis vian leteron, kaj kun malĝojo mi legis ĝin! Bedaŭrinde, kion fari? Mi komprenas vian situacion! Se la cirkonstancoj estus iom aliaj, ankaŭ en mia lando ekzistus esperantista eldonejo, kaj mi ne estus devigata turni min eksteren!

Mi verkas jam de pli ol 20 jaroj. Mi havas manuskriptojn de 14 diversaj libroj! La manuskriptoj amasiĝas. Sed la emo kaj inklino dume perdiĝas kaj malkreskas. Kaj, iutage, verŝajne, mi ĵetos ĉion en kamenon kaj komencos interŝanĝi poŝtmarkojn aŭ kolekti alumetskatolajn etikedojn! Ĉar tio, evidente, donas pli da sukceso ol la tuta originala literaturo esperanta kune!

Cetere, la rifuzoj ne surprizas min! En nia gazetaro svarmas stultaj tradukaĵoj, kiujn ĉiu abomenas kaj evitas. Sed — la originalaĵojn oni reĵetas pro — spacomanko! Kaj poste oni miras, ke la esperantistoj ne legas! Nu, mi miras, ke *malgraŭ ĉio*, ili ankoraŭ ĉiam legas plu! Ĉar tio estas pli ol miraklo!

Mi vivas en malgranda urbeto! Tamen eĉ ĉi tie mi vidis Otelon jam trifoje aŭ kvarfoje! Kaj nun vi devigas min, ke mi legu ĝin la *kvinan* fojon! Ne koleru, sed tio estas masturbado, kiu superas miajn fortojn! Legi Antigonan dekfoje! Tio egalas la Dantean inferon (kaj, spite tion, mi legos Otelon, ĉar ĝi estas STAFETO-libro)!

Kion, efektive, ni volas propagandi? Ĉu Esperanton? Aŭ ĉu la anglan kaj grekan literaturojn? Sed Baudelaire, ekzemple, kaj Sofoklo ne estas esperanta literaturo! Ĉiu tia aserto estas nur trompo, mensogo kaj intenca mistifiko!

Kiel esperantiston Ŝekspiro ne interesas min! Ĉar mi ne lernis Esperanton por legi Ŝekspiron! Mi lernis Esperanton, por legi ion, kion mi *ne povus* legi *aliloke*! Mi lernis Esperanton pro Auld. Szilágy, Waringhien, Régulo, Boulton kaj Rossetti! Nenio estus okazinta, se *La flo-roj de l'malbono* ne estus aperintaj! Sed okazis multo, kiam via esearo ne aperis! Se mi povus konsili al vi, mi konsilus jene: Elĵetu *Otelon* (aŭ iun alian mucidan kaj superfluan tradukaĵon!) kaj eldonu LA DEKTRIAN VOLUMON! Ĉar, se io estas fatraso, ne esperantisto estas aŭtoro de tio!

Mi bonvenigas ĉiun nove aperintan libron! Renkontinte ĝin, mi sentas preskaŭ infanecan ĝojon! Sed tradukaĵo efikas al mi same, kiel ruĝa tolo al iu ajn brava hispana taŭro: ĝi provokas min!

Cetere, ĉiu originala esperanta voĉo estas multe pli valora ol la plej genia vorto tradukita! Kaj — ni estas tro malgranda nacio, por povi perdi eĉ voĉeton!

Nu, kaj nun deklaru min idioto! Sed sciu, ke post dudek jaroj oni proklamos la samon multe pli draste kaj insiste! La tradukaĵojn oni signos krimo, kaj eĉ ŝakalo ne priploros ilin!

Sed, vi — ĵus mi eksentis emon verki novan (jam la dekkvinan!) libron *La traduka plago* (tiun mi proponos al vi por la publikigo)!

Fine — certe ne estas necese akcenti, ke mi *ne atendas* respondon je ĉiu mia letero! Mi povas imagi, ke vi estas ege okupita, kaj ke vi ne havas tempon por amuzi vin per korespondado!

Kaj — ankoraŭ io: Ne opiniu, ke la supraj linioj estas riproĉo! Certe ili ne estas atako kontraŭ vi! Mi scias, ke vi faras, kion vi kapablas! Kaj ne estas via kulpo, ke niaj *spiritaj fortoj* estas iom pli grandaj ol niaj *fizikaj ebloj* (kiom da nacioj povus nin envii)!

Cetere, vole nevole, mi devas rememori la poemon *La lasta* de Newell (dediĉitan amike al Idista poeto):

*Kiel soldato kantas romana,  
Sola ĉe l' lasta landlim' forgesita,  
Kuraĝa ĉe sia posteno  
Dum detruas patrujon barbaroj:*

*Kiel sur morta tero mortkantas  
Siajn amatojn lasta homido,  
Sub neĝeroj silente ŝvebantaj,  
Atendante la blindan ĥaoson:*

*Tiel, Idisto lasta, vi kantas  
Morne al mondo, kiu forgesis  
La lingvon de vi amegatan.  
O poeto fidela, saluton!*

Ankaŭ mi kantas morne, sola ĉe la lasta landlim' forgesita, atendante la blindan ĥaoson.... Kaj mi scias, ke mi ne elsaviĝos....

Mi almetas kelkajn poemojn kaj mi salutas vin elkore. Altestime via

Karolo PIĈ



La Laguno, en aprilo 1961.

Kara samideana amiko!

Via letero kortuŝis min. Ankaŭ mi verkas en esperanto jam de preskaŭ 25 jaroj. Kiam mi starigis la STAFETO--eldonojn en 1952, mi apenaŭ antaŭvidis, ke en ĉi ties serioj iam aperos volumo mia. Poste, je insista peto de kelkaj amikoj, mi pretigis unun, sed jam de pli ol kvar jaroj ĝi kuŝas en prestaŭga manuskripto, eĉ prologita de alilanda samideano, ĉar dume sin trudis pli urĝaj kaj *gravaj* — laste ĉefe tradukoj! — eldonproponoj. Nun, tuŝita de via letero, mi denove puŝis ĝin kelkajn klaftojn suben por doni lokon al volumo via. Mi formale promesas eldoni unu vian volumon! Sed vi devas iom pacienci. Mi eldonos ĝin en la serio Beletraj Kajeroj, de kiu ĝis nun aperis *ok* volumoj, sed mi devas vin informi, ke antaŭ akcepto de la via, mi jam estis devontiginta min eldoni aliajn *dekkvar*



titolojn, krom la ok jam presitaj. Via volumo do estas la *dekkvina* en la vico de la presotaj. Probable iu(j) el tiuj dekkvar manuskriptoj, pro kiu ajn kaŭzo, ne venos ĝustatempe, kaj sekve via atendotempo laŭe mallongiĝos. Nu, inter la tago de Sankta Neniamo kaj mia fluktua dato, certe vi bone povas akcepti la alternativon.

Pri la traduka literaturo, mi ne samopinias kiel vi. Tamen pri STAFETO vi ne povas tiel draste plendi. Ĝis nun STAFETO eldonis dudek sep volumojn kun rondcifere iom pli ol 6.000 paĝoj; el ili nur kvin volumoj kun ĉirkaŭ 1.200 paĝoj, t.e. proksimume la kvinono, estas tradukoj. Kaj se la tradukoj ne estas pli nombraj, tio ŝuldiĝas simple al la fakto, ke mi ne disponis *taŭgajn* manuskriptojn, laŭ la beletraj kriterioj, kiujn por envicigi iun STAFETO starigis. Laŭ mia kompreno, kiel ajn granda estas mia ŝato kaj simpatio por nia propra originala literaturo, esperanto perfektigis kiel *literatura lingvo* ĉefe dank' al elstaraj tradukoj, kiujn iniciatis Zamenhof mem. Same okazis ĉe multaj gentaj lingvoj, kaj konkrete ĉe ĉiuj latinidaj (pri la aliaj mi ne havas tiel senperajn konojn kaj sekve mi ne povas tiel firme aserti). Ni ne pretendu esti pli saĝaj ol Zamenhof kaj la tradicio kaj sociala sperto de multaj naciaj lingvoj. Por mi *Hamleto*, *Infero*, *La floroj de l' malbono*, *Otelo*... estas ĉefverkoj de la *esperanta* literaturo, kiel ajn "mucidaj" ili povas aperi al vi! Kaj nun mi pretigas min lanĉi la plenan poemaron de Heine.

Mi profitas tiun ĉi okazon por esprimi mian konstaton pri unu certe unika trajto de Esperantujo, kiun vi ankaŭ aludas: dum la kuranta jaro, krom la akceptitaj, mi devis ankaŭ *rifuzi* pli ol dek eldonproponojn, kaj simile en antaŭaj jaroj. Dume, 1.000-ekzemplera eldono de la ĉie kaj prave akklamata Baghy, post tri jaroj ankoraŭ ne disvendigis! Kiel plendis "Germana Esperanto-Revuo" (marto 1961), "ni preskaŭ devas kredi ke ekzistas pli da aŭtoroj ol legantoj en Esperantujo!"

Esperable la ekvilibro inter la verkanta kaj la leganta

publikoj baldaŭ restariĝos, tiel, ke STAFETO povos firme pluri al novaj atingoj.

"Ni laboru kaj esperu!"

Tre amike kaj samideane via

J. Régulo Pérez

P.S. Kiam jam de longe mi estis sendinta la supran leteron, jen en 30.5.61 mi legis la trian parton de la artikolo de W. Auld *Esperanto kiel literatura lingvo* en la maja kajero 1961 de "Esperanto", kaj ĉar la komenco de tiu III daŭrigo enhavas la plej bonan defendon kaj pravigon de la traduka literaturo en nia lingvo, kiun mi ĝis nun legis, mi plej varme rekomendas ĝin al interesatoj pri la temo. Same varme mi rekomendas atentan studon de la cetero de tiu bonega eseo. — J.R.P.

#### NOTO DE LA REDAKTORO:

*Precipe unu frazaro en la letero de kolego Piĉ trafe montras, kiel medaliono povas havi du flankojn. Li skribas: "...mi ne lernis Esperanton por legi Sekspiron! Mi lernis Esperanton, por legi ion, kion mi ne povus legi aliloke!" Tio estas saĝa konstato, ĉar mi ne dubas, ke Sekspiro, Dante, Baudelaire, k.a., estas facile haveblaj en ĉeĥa lingvo, eble eĉ en bonaj tradukoj. Sed ni rigardu la inverson. Mi, ekzemple, lernis Esperanton interalie por legi verkojn ĉeĥajn, hungarajn, bulgarajn, japanajn, estonajn, k.s. — ĉar mi ne povas legi ilin aliloke, tial ke anglaj tradukoj ne ekzistas. Kaj se amiko Piĉ estus devigata elsuferi la ĝenerale sengenajn banalaĵojn, kiuj sin prezentas kiel tradukojn en anglalingvaj medioj, li eble havus pli ekvilibran sintenon al la tradukado en Esperanton. Nia originala literaturo estas tre grava; sed aliflanke unu el la taskoj de nia lingvo estas peri ankaŭ alilingvajn kulturaĵojn al tiuj, kiuj ne povas ilin atingi alimaniere. KREDU al mi, en Britujo klera esperantisto scias pli pri la efektiva mondliteraturo, ol eĉ la plej dokta neesperantisto — dank' al la tradukoj en Esperanto!*

## GRAVEGA SUKCESO EN URBO VENADO TUERTO (Argentino)

Gravegan sukceson sen precedencoj en Argentino atingis la Esperanta Klubo de Venado Tuerto en Provinco Santa Fé.

Ĉefe la menciita Klubo estas unu el la plej aktivaj grupoj en la lando. Fondita en 1953, kiel rezultaĵo de publika kurso de Esperanto gvidita unuafoje en ĉi tiu urbo de samideano Jorge Abraham, talenta esperantisto kaj kompetenta lingvisto, ĝi povis jam akiri terenon por konstrui tie la Esperanto-Domon propran: modernan klubojn konsistantan el klasĉambro, legoĉambro, sekretario, banĉambro kaj negranda korto por kunveni je aero libera en somero. La Esperanto-Domon oni projektis tiamaniere, ke en okazo de bezono la tri ĉambroj fariĝos eleganta salono por bonvenigi multenombrajn personojn okaze de grandaj kunvenoj kaj festoj. La murojn apartigantajn la diversajn ĉambrojn oni povos forŝovi por havigi al la publiko vastan, komfortan kunvenejon.

Kompreneble, la estraro de la klubo multe penadis kaj klopodadis por povi aĉeti la terenon en progresema kvartalo de la urbo.

La Esperanto-Klubo de Venado Tuerto estas modelo de organiziteco pro la trafaj kaj ĝustaj procedoj de ĝiaj gvidantoj. Ankoraŭ restas gravurita en la memoro de la argentinaj esperantistoj la lasta Argentina Esperanto-Kongreso okazinta en tiu urbo pro la perfekteco de la prezentado kaj eroj de la programo, inter kiuj elstaris la ago de la ĥoro de esperantistaj infanoj — majstre gvidita de sinjorino Amalia Solis —, kaj la meso en katolika preĝejo kun Esperanto-prediko farita de samideano Pastro Bruno Ostropolski. Krome, la Klubo sukcesis pri tio ke la urbo donis la nomon "Esperanto" al unu strato de la urbo. Al tio ni devas aldoni aliajn sukcesojn: la klubo estas ag-

noskita kiel jura persono, kaj estas subvenciata de la urbo per la modesta sumo de ducent pesoĵ ĉiumonate.

Sed la grandega sukceso atingita antaŭnelonge estas tio, ke la Klubo ricevis de la Provinca Registaro, pere de la Ministerio por Edukado kaj Kulturo, la grandan sumon de CENT MIL pesoĵ kiel subvencion destinitan al la konstruigo de la propraejo.

Efektive, la klubestraro dum vizito al lia moŝto la urbestro de Venado Tuerto, raportis al li pri la senmoneco de la Klubo por realigo de esperantista revo: la propra sidejo. Lia moŝto la urbestro, sinjoro Vicente Cibelli, peradis ĉe la Provincestro, Moŝtulo D-ro Carlos Sylvestre Begnis, la oficialan monhelpon por la Klubo.

Kaj lia Moŝto la estro de la provinco, komprenante la altan meriton de nia afero, kaj konsultinte la aprobon de lia Moŝto la Ministro por Edukado kaj Kulturo, D-ro Félix Pagani, sankciis la historian rezolucion, laŭ kiu la Stato Santa Fé donacis al la Klubo la altan subvencion — \$ 100.000,00! — senprecedencan en nia Movado en Argentino.

La esperantistaj societoj kaj unuopaj samideanoj en la tuta mondo estas petataj nepre sendi dankleterojn al lia Moŝto la estro de Provinco Santa Fe pro la grandega helpo farita al nia Movado en la Argentina Respubliko.

La adreso de la Moŝtulo estas:

Sr. Gobernador de la  
Provincia de Santa Fé,  
Dr. Carlos Sylvestre Begnis,  
Ciudad de Santa Fé  
Argentina.



## Pri la Farso de Advokato Patleno

Oni ne konas la aŭtoron de tiu mezepoka ĉefverko. Oni provis atribui ĝin jen al iu, jen al alia — sed neniu ĝisnuna esploro vere kaj definitive malkovris ĝian aŭtoron. La plej fama supozita aŭtoro estas François Villon. Ĉefe pro la simileco lingva kaj esprima forto poezia, sed ankaŭ pro la eksterordinara talento kiun tiu verko rivelas ĉe la nekonata aŭtoro.

Oni ankaŭ ne konas la precizan daton nek la lokon de la apero de Advokato Patleno. Neniu tiurilata atesto postrestis. Krom la verko mem. Ĝi sola, per sia nura teatra valoro kaj siaj scenaj kvalitoj, pro kiuj ĝi elstare distingiĝis de la samepokaj teatraj tekstoj, ek de sia ekesto kaj tra la jarcentoj, — altrudis sin al la atento kaj admiro, eniris proverbe per multaj siaj esprimoj en ĉiutagan popolan paroluzon, sigelis tiel forte la popoltipon de Patleno ke tio verŝajne forgesigis la nomon de la aŭtoro kaj tra duona miljaro alvenis ĝis ni sendifekta. Per studo de la teksto, oni situas ĝian aperon proksimume ĉirkaŭ la jaro 1470. Loko — verŝajne, preskaŭ certe, — Parizo.

La teksto malkovras ankaŭ la grandegan talenton de la aŭtoro. Tiu verko tiom elstaras inter ĉiuj mezepokaj teatraj verkoj, ke oni ne povas pensi kompare malkovri inter iliaj aŭtoroj la nomon de la aŭtoro de Advokato Patleno. La fajneco de la observado, la vivanteco de la roloj pentritaj sen prijuĝoj kaj kliŝoj, montras ĉe la aŭtoro altan instruitecon, spiriton eminentan, liberan, ironian, plenan de socia primoko, esceptan por tiu epoko. La aŭtoro transprenis la jam tiam ekzistantan tradician popolan tipon de trompisto Patleno, sed li riĉigis ĝin tiagrade ke, depost la apero de la verko, lia Patleno fariĝis la sola provizanto de pripatlenaj popolesprimoj. Tiu brila sukceso instigis aliajn aŭtorojn verki novajn farsojn pri Patleno: Nova Patleno, Testamento de Patleno ktp. Ili ĉiuj estas tiom malhavaj je talento kiom Advokato Patleno estas plena. Plena de talento, de pura teatra esenco, verkita por scena prezentado, por ridigo de publiko plej diversa, de la plej popola ĝis la plej eminenta, — ĝi estas verko unika en sia epoko. Verko arta, perfekta, senmanka. Renesancaj humanistoj ĝin komparas kun la ĉefverkoj de la greka kaj latina teatro. Pro la ĝenerala admiro, kiun ĝi ĝuas ek de sia ekesto, oni tradukas ĝin baldaŭ en tiaman internacian lingvon — en latinon. Oni rekomendas legi ĝin samrange kun la versoj de Virgilo kaj la Psalmoj de Davido. Tiu admiro neniam ĉesis. En Francujo mem oni ĝin reprenis sennombrajn fojojn. Ĉar la franca lingvo daŭre evoluadis, oni do daŭre "tradukis" tiun francan tekston en francan laŭepokan lingvon. Tio alportis multajn adaptojn, modernigojn, eĉ prozigojn de la versoj. Neniu el tiuj provoj egalvaloras la originalan antikvan tekston en vervaj rimigitaj oksilaboj. Sed bedaŭrinde la originalan tekston, densan kaj fortan, oni ne plu kuraĝas prezenti en Francujo; tiom la moderna franca lingvo estas malproksima de la tiama. Pro respektado al la verko, oni ne plu prezentas ĝiajn francajn tradukojn, adaptojn kaj modernigojn kiel oni tion faris dum la lastaj jarcentoj. Sed paradokse, escepte de Francujo, ĝi estas tradukite ludata ĉie en la mondo kun granda sukceso. Tiu brila, mirinda mezepoka verko, dormanta nun sur sia origina grundo, fariĝis universala kultura havaĵo de la tuta homaro, viglas per freŝa intensa teatra vivo — dank' al tradukoj! Plej diverslingvaj! Oni tradukis ĝin jam en mezepokan internacian lingvon — oni tradukis ĝin ankaŭ en hodiaŭan internacian lingvon! La esperanta traduko kiun prezentas la Internacia Arta Teatro estas fakte jam la tria! Ankaŭ tio estas signifa kaj modeste

substrekas la esceptan intereson kiun ĉiam vekis kaj vekas tiu ĉefverko.

Ja ĝi estas ĉefverko! Eĉ en ŝajnaj mankoj montriĝas ĝia granda arta valoro, potenca talento de ĝia nekonata aŭtoro. Ĝia duobla intrigo ekzemple, origine certe nur teknika altrudo kiun postulis normale longa prezentado, finfine fariĝis fajne interplektita. Tiutempe en metio de drapisto la bredado de ŝafoj estis nepre necesa paralela okupiĝo. Tiel jam la unua intrigo preparas la alvenon de la paŝtisto, la protagonisto de la dua intrigo. Krome en la dua ambaŭ agoj estas tiom intime intermiksita ke ili fakte fariĝas unuecaj. Prezentiĝas unu post la alia — ili ricevas ambaŭ samtempe la solvon. Al ambaŭ ŝtelistoj oni samtempe pardonas iliajn ŝtelojn. Alia trajto de ŝajna neperfekteco: manko de morala instruo. La farso — verdire unua franca komedio — alportas nur ŝajnan moralan instruon pri trompisto trompita de alia trompisto. Sed ĉu ĝi estas manko? Ĉu la aŭtoro intence ne volis doni tian amaran konkludon? Fakte la tuta komedio estas kruela priskribo de ĝenerala, universala intertrompado. Advokato Patleno trompas la drapiston, avarulon kiu siavice pensas trompi lin vendante al li la drapon pli koste ol estas ĝia valoro. Gijemeta, edzino de Patleno, ankaŭ sekvas la bonan ekzemplan. La ŝafisto ŝtelas kaj trompas la drapiston — kiu volis trompi lin ekspluatante lian naivecon. La juĝisto — kies devo estas defendi la juston — nur pensas kiel plej ekspede solvi la aferon kaj absolvas la ŝteliston. Tiu aldone trompas la trompiston. En tia mondo de nuraj trompistoj devige inter ili troviĝas ankaŭ la trompitoj! Kruela bildo de la iamaj moroj! Kaj se oni konstatas ke la komedio ankaŭ nun havas la saman sukceson kiun ĝi havis ĉiam — oni povas konkludi ke la moroj ne ŝanĝiĝis! Verdire, samkiel la plej bonaj komedioj de Molière estas fakte kruelaj tragedioj, kaj tial eĉ pli kruelaj, — Advokato Patleno estas kruela homa tragedio en komedia formo. Kruela, amar-konkluda, malesperiga. Komedio kiu per rido vipas la morojn. *Castigat ridendo mores, comoedia!*

Ja ĝi estas majstra ĉefverko! Gaja kaj amuza — sed profunda kaj serioza. La kolekto de la Internacia Arta Teatro havas la honoron prezenti ĝin internacilingve al internacia publiko de la Internacia Arta Festivalo.



S-ano Hans Tressel, 81-jara, festas sian oran jubileon kiel Delegito de UEA en Munkeno, Germanujo. Milojn da personaj petoj, deziresprimoj kaj informoj li plenumis akurate kaj konsciencie sen iu ajn materia rekompenco. Multaj, eble pli ol mil, esperantistoj el ĉiuj kontinentoj sentis sin "amikaj gastoj" en lia familia rondo. Jen f-ino Jojiko Kajino sidas inter ges-roj Tressel, dum s-ro Taddos Megalli staras malantaŭe. Ĉeestas ankaŭ la du filinoj de s-ro Tressel, kaj s-ano Gräf.



# Novaj Libroj

Duope ricevitajn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

\*) ricevebla ĉe U.E.A.

**SIMPOSIO de Platon**, trad. S. Sakellaropoulos. 77 p. maŝinskribitaj kaj forte binditaj. Prezo: 6 ŝ., kun afranko. Mendebla ĉe Helena Esperanta Asocio, Agiou Konstantinou 6, Ateno, Grekujo.

Jen la unua dialogo de Platono komplete tradukita Esperanten. Per tio ankoraŭ alia verko aldoniĝis al la malrapide kreskanta aro da tradukoj el la klasika antikveco; kaj ĉi foje ĝi venas el la lando kies lingvo estas la ido de tiu de la originalo. Iagrade do la aŭtoro tradukis el sia gepatra lingvo.

Tio per si mem ne garantias la ekzaktecon de la traduko, ĉar la diferencoj inter la du fazoj de la lingvo estas sufiĉe grandaj por ke nur aparta studado de la unua povu liveri la signifon. Bonŝance, S-ro Sakellaropoulos estas ne nur moderna Greko, sed ankaŭ evidente erudiciulo en la kampo de la malnovgreka literaturo. La kvar enkondukaj ĉapitroj (24 p.) provizas abundon da informoj necesaj por la kompreno de la dialogo: la aranĝo de antikvaj Bankedoj, tiu aparta formo de "eroto" por kiu la Grekoj havis vorton, kaj la ideala eroto de la Platona Sokrato. La traduko mem estas fidela, klara, kaj liveras bonan ideon pri la etoso de la originalo. (Ekzemploj de bona traduko kiu trafis min estas: *Despli anstataŭ* (33/10, kie la Greka frazo estas nekompleta); *fleksebla kiel likvido* (48/16 ὑγρός); *heroismo* (61/3 ἀρετή; Jowett malbone: *virtues*); *supreniris* (63/-10 ἐπανάγω, kiel ĉe Jowett kaj la de la tradukinto konsultita sed ne ĉiam sek-vita Sikoutri). La teksto uzita ne estas tiu de la Oksforda eldono; ekz. p. 28 (173d) *maniulo* (malforta), p. 61 (209a) *dian* (fraŭlo), p. 74 (221b) *alia* (amiko).

Sed la verko havas unu grandan mankon: ĝi ne estas presita. Esperante, ke iam ĝi aperos, kiel ĝi meritas, libroforme, mi rekomendas reviziadon, interalie, jene: -(a) *Traduko*: korektu 35/3 *ili amas pli la korpojn ol la animojn* (ili amas, ne la animojn, sed la korpojn); 33/5 *interamatoj* (amantoj); 35/25 *infanoj nesciantaj* (infanoj pro nia nescio); 39/6 *vi ne elparolos kelkajn vortojn* (Ekparolu tuj); 49/-3 *donacema al bonvolo* (d. de b.); 56/6, *terura al* (t. en). Plue, enmetu vortojn ellasitajn ekz. antaŭ *Afroditi* (32/6),

post *T.e.li* (32), kaj post *finis* (38). (b) *Gramatiko*: forigu erarojn, ekz. li *estis instruita muzikon* (1), *lia* por *sia* (1/8), *kreskintaj* transitiva (12/9, *daŭrigis* netrans. (13/19), *malaperinta* por *perdita* (14/18), *necesis* por *bezonis* (15/-4), *sia* por *ilia* (17/24), *eblan* por *ebla* (17/-9); *lernemajn* por *lernemaj* (19/15), *sufiĉante* por *estante kontenta* (22), *faris al mi pensi* por *igis...* (28), *malĝojos* por *-igos* (32/-1), *ebriita* por *-igita* (55/-12). Ĉe 7/-1 *per la kupu* kaj 20/13 *al ĉies sana homo la eroto*, preseraroj eble kulpas.

Pli agacaj tamen ol ĉi tiuj eraroj estas pluraj arbitraĵoj; ekz. Propraj Nomoj laŭ novgreka prononco: *Sokrati*, *Alkiviadi*, *Sparti* ktp.; ellaso de subjekta pronomo en dependaj frazoj; *kies* laŭ franca *dont*; *kelkaj*, *multaj*, *pliaj*, *ambaŭaj* kiel substantivoj; *malmulton* anst. *malmulte*; pluralo de korelativoj en *-io*; konjunkciaj formoj kiel *donite ke*, *estante ke*; *sekve ke -u* anst. *tiel ke as (is)*; *antaŭ ol -u*. (La *multuloj*, tamen, por ol πολλοί estas akceptebla).

Resume, la tradukinto faris tre kompetentan laboron; sed kiel Platonisto, li certe konsentos ke traduko el la majstro devas esti verkita, simile al kontribuaĵoj al nia *Revuo*, "en perfekta Esperanto". Aperu baldaŭ reviziita eldono, libroforma.

D. B. Gregor

**LA BELA SUBTERA MONDO\***. Libro pri grotoj de Leander Tell. N-ro 3 de Popularscienca Eldon-serio de Stafeto. Eld. J. Régulo, La Laguna, 1959. 96 p. 24 × 16 broŝ. ilustrita. Prezo 7,40 gld.; 29,60 st.

La homo ĉiam volis esplori la nekonatajn lokojn de la universo kaj utiligi ilin. Tiu praktika esploro estas ja virto, kiu troviĝas en preskaŭ ĉiu homo. La prahomo esploris la kavernojn, kies aperturojn li rimarkis, kaj uzis ilin kiel ŝirmejojn, loĝejojn, minejojn kaj templojn. La hodiaŭa homo esploras ilin kun aliaj celoj ne malpli praktikaj ol tiuj de liaj praa-voj. Kvankam li uzas ilin nun nur dum militoj kiel ŝirmejojn kontraŭ aeratakoj kaj loĝejojn por partizanoj, ili ankoraŭ havas grandan praktikan valoron kiel muzeoj pri la socia vivo kaj la arto de la prahomo kaj pri la historio de la rokoj.

Plezuron ili ankaŭ donas al la nuntempa homo. La kuraĝulo trovas eks- citajn aventurojn, kaj por la malpli

kuraĝa homo oni sendangerigis multajn kavernojn kun la celo montri al turistoj la kuriozajn kaj ofte belajn ŝtonformaciojn en la interno de la tero. Rigardante stalaktitojn kaj stalagmitojn, oni miras pri la miloj da jaroj bezonitaj por ilia formiĝo.

Leander Tell, faka spertulo pri kavernoj, per unu volumo originale verkita en Esperanto provizis por ni gvidlibron al la subtera mondo kaj lernolibron pri la arto de la subtera alpismo. Pli ol triono de la libro estas dediĉita al laŭlanda priskribo de vindaj grotoj tra la tuta mondo. Tiu listo estas precipe valora al la Esperantisto, kiu multe vojaĝas. Grotoj troviĝas preskaŭ ĉie, eĉ en Nederlando!

La libro enhavas entute 54 bildojn. El ili pli ol 30 fotoj ilustras la priskribon pri grotoj. La ceteraj montras prahistoriajn kavernpentraĵojn kaj artobjektojn kaj kuriozajn bestojn kaj fiŝojn el kavernoj.

Oni ne supozu, ke la libro estas seka scienca disertacio. La verkinto priskribas multajn aventurojn de li mem kaj de aliaj famaj kavernesploristoj tiel vigle, ke oni soifas al pluaj tiaj rakontoj; kaj liaj sciencaj klarigoj pri la origino de kavernoj kaj ilia enhavo estas simple, entuziasme kaj interese verkitaj. Pli bonan popularscien- can libron pri la temo oni malfacile imagas.

La stilo de la verkinto estas kontrolita de Stellan Engholm, kio garantias ĝian ĝenerale altan kvaliton, kvankam kelkloke li uzis adverb- an participon anstataŭ adjektivan, kaj akuza- tivan post "tra".

Pluraj preseraroj troviĝas en britaj loknomoj en la sekcio pri Britujo, verŝajne pro la malfacila karaktero de la angla ortografio. Gaping Hill, Port Newydd, Hull Pot, Simpson Pot, York devus esti Gaping Gill, Pontnewydd, Hell Pot, Simpson's Pot, Yorks. Es- pereble tiaj eraroj ne troviĝas en alilandaj loknomoj cititaj.

Edward Ockey

**Joracy Camargo DIO REKOMPENCU VIN\***, komedio. El la portugala tradukis Sylvio Peixoto. Paĝoj 172, formato 18½ × 13 cm. Eldonis Kultura Koope- rativo de Esperantistoj, Brazilo, 1959. Prezo: 3,75 gld.; 15 st.

Antaŭ la "monumenta ĉefa pordego de malnova preĝejo" du almozpetuloj filozofias pri la vivo, amo, politiko, socio, kaŭzoj de sukceso kaj malsuk- ceso, en mallongaj, bone konstruitaj frazoj, kapablaj kateni la atenton de spektantoj.

Verŝajne ĝuste al tiuj lerte konstruitaj mallongaj frazoj, el kiuj ŝpru- cas originaleco kaj sprito samkiom profunda penso, la dramo dankas sian sensacian sukceson. La esperan- ta traduko estas farita el la 20-a por- tugallingva eldono. La komedio estis prezentita en ĉiuj brazilaj teatroj kaj en multaj eksterbrazilaj, inkluzive



eŭropajn. Ĝi estas tradukita en preskaŭ ĉiujn pli gravajn lingvojn. la aŭtoro de la komedio Joracy Camargo ricevis la honoran titolon esti la iniciatoro de la brazila socia teatro. La lastaj du paĝoj de la libro informas leganton pri la ega fekundeco de la verkisto Joracy Camargo, kiu verkis 32 teatraĵojn, krom operetoj, radio-noveloj, film-scenaroj kaj artikoloj. La komedio DIO REKOMPENCU VIN estas verkita antaŭ 29 jaroj. Certe en la lastaj 30 jaroj multo en la mondo ŝanĝiĝis kaj la ideoj de la aŭtoro pri la moralo ne estas tiel kuraĝaj, kiel tio estis en la tempo post la Unua Mondmilito, nek la socia tendenco akra, nek la individuecaj problemoj aktualaj, nek la dramtekniko moderna.

Tamen la frazoj kiaj :

"Ĉiuj religioj estas perfektaj, Ne-perfektaj estas ja la homoj."

"La homoj timas nur tion, kion ili ne vidas...."

"La kapitalistoj estas homoj senutilaj, kiuj tamen el ĉio faras al si utilon."

"Malamiko de la homo estas la homo mem."

"La grandaj veroj estas tiel absur-

daj, ke estas malfacile kredi al ili." — kapablas ankaŭ hodiaŭ veki entuziasman aplaŭdon de la spektantoj, ĉar ili estas, eble ne plu avangardisme originalaj, sed sencoplenaj kaj profunde sinceraj. La tuta dram-teksto konsistas nur el tiaj meditadoj, kiuj certe ĉe la fino de la tria akto jam ĝenus rigardantojn, ĉar kio troas, estu eĉ la plej bona, vekas trosatiĝon. Sed la aŭtoro ĝuste per sia brila frazkonstruo kaj moderna tekniko (sceno en sceno) evitis tion kaj permesis al rigardanto kun ĝuo digesti abundon de liaj ideoj pri ĉio en la homo, super la homo kaj ĉirkaŭ la homo.

La esperanta vesto, kiu ebligas al la internacia publiko konatiĝon kun tiu fama brazila verko, estas bona. Oni fakte ne povas kun certeco scii, kies merito por esperantigo estas la plej granda. Sylvio Peixoto en la "Prezento" titolas sin mem "mallerta tradukinto" kies "sennombrajn nekorektaĵojn" poluris la eminentaj brazilaj esperantistoj Prof. Gomes Braga kaj D-ro Carreiro Neto. Malgraŭ tiu admirmerita kunlaboro, kelkloke oni ne scias, ĉu la belecon de la lingvo makulas pres- aŭ gramatikaj eraroj (tiel

malsama OL tiu; PER kio vin interesas), kelkloke la vortoj estas iom plumpaj (malfermegitaj, neantaŭdeciditajn, enmagazenigita, formoj speciale evitindaj en drama teksto).

La eldonisto Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro, estas duoble gratulinda: ĉar ĝi eldonis la libron DIO REKOMPENCU VIN omaĝe al la Jubilea jaro de D-ro Zamenhof kaj ĉar ĝi eldonis nuntempan kaj tre faman verkon. Sur la dorsa kovrilpaĝo, la Kooperativo informas pri sia vasta aktiveco. Ne mirige, ke la eldonisto, ŝargita per tiel granda laborprogramo, forgesis informi pri la nomo de la desegnisto, kies desegnaĵoj, en stilo de libere interpretita realismo, okupis kelkajn paĝojn de la libro. Sed kvazaŭ rekompenci tiun mankon, la eldonisto ion tro akcentis: sur ĉiu, sed laŭvorte sur ĉiu paĝo de la libro, estas presita la nomo de la aŭtoro kaj titolo de la libro. Do, la tipografia vojo helpas, ke tiuj du nomoj gravuriĝu en la memoro de leganto ĝis forges-maleblo.

Emilija Lapenna

## NIA FORUMO

### Cu ni vere bezonas literaturon ?

Ankaŭ mi ne aĉetis la libron "Songe sub Pomarbo" de Julio Baghy. Mi neniam starigis al mi la demandon *kial* ? Sed, ĉar d-ro Nagy deziras de mi respondon, de mi kiel esperantisto de pagipova lando, mi klarigas al li mian sintenon jene :

Generale la Hungaro, Japano, Franco aŭ Turko lernas fremdan lingvon ne pro amo al la koncerna literaturo, sed pro la *speciala celo sia*. Simile, mi eklernis Esperanton ne pro ĝia literaturo, sed pro speciala celo mia. Mi vidas en Esperanto — kun aŭ sen nia meritplena Julio Baghy — la plej bonan helpilon alproksimigi homojn de bona volo, sed de malsama idiomo, unu al la alia. Per interkompreniĝo tutmonda, mi esperas pacon tutmondan. Ŝajnas, ke mia opinio ne staras izolita en la esperantistaj rondoj, ĉar oni legas en Esperanto, Aprilo 1961, ke oni proponis UEA kiel kandidaton por la Nobel Pacpremio 1961. El tio evidentiĝas, ke nia merito tute ne kuŝas sur tereno literatura. Ĉu la estraro de UEA kaj kun ili la tutmonda esperantistaro hontu, ke oni ne proponis UEA por la Nobel *Literaturpremio* 1961 ? Disvastigi la esperantan literaturon ne estas nia ĉefa klopodo. Belarto estas *faka* branĉo en nia movado. La ita-ata problemoj ankaŭ estas *faka* branĉo. Estas pura *faka* problemoj de lingvistoj "Cu ni vere bezonas literaturon ?", kaj tiun-ĉi demandon oni ne metu antaŭ la *esperantistoj de pagipovaj landoj*. La esperantistaro ne estas literatura rondo,

tial *ne juĝu* ilin laŭ la aĉetado de libroj. Esperanto ne estas la plej bona lingvo en la mondo, sed nur *la plej bona helpilo* por la pacaj batalantoj, "Ĝis la bela sonĝo de l'homaro, por eterna ben' efektivigo."

La homoj de 17 ŝtatoj, kiuj proponis UEA por la Nobel Pacpremio 1961 opinias, ke ni marŝas firme sur la ĝusta vojo. Tio tiom ĝojigas min, ke mi, esperantisto de pagipova lando, senhonte publike konfesas, ke ankaŭ mi ne aĉetis la libron "Songe sub Pomarbo" de Julio Baghy.

John Futran

### Misuzo de Esperanto

Ni klopodas enkonduki Esperanton en la komerco. Por tiu celo seriozaj samideanoj instigas komercajn firmojn reklami en la jarlibro de U.E.A. kaj en aliaj adresaroj. Ne estas facile konvinki la komercistojn ke la reklamo en esperantaj publikaĵoj portos fruktojn. Tamen kelkaj firmoj faras la provon kaj atendas aĉetdezirojn por siaj varoj. Kaj la rezulto ? Nürnberga firma raportas ke alvenis multaj poŝtkartoj kun la peto pri alsendo de prospektoj pri la urbo Nürnberg. Tio estis ĉio. Kiel stulte agas tiuj esperantistoj, kiuj atendas de firmoj, kiuj volas vendi siajn varojn, la alsendon de gvidfolioj. Ili senkreditigas kaj ridindigas la homojn, kiuj varbis la firmojn por reklamado. La firmoj ja pagis monon por la reklamo. Oni ne atendu ke ili krome iru al turisma oficejo, aĉetu prospektojn kaj sendu ilin al aliideanoj, kiuj ne povas legi ke la firma vendas farbŝprucigilojn. La firmoj ne estas ĉiam samideanoj kaj ne reklamas pro idealismaj celoj, sed ili volas vendi siajn varojn kaj gajni

monon. Multaj el ili estas dubemaj kaj post tiuj spertoj ne plu reklamos per Esperanto, kontraŭe ili avertos aliajn komercistojn.

Se oni volas havi prospektojn de iu urbo, oni skribu al la turisma oficejo, kiu senpage forsendas ilin. En petoj al delegitoj aŭ esperanto-societoj oni aldonu respondkuponon, ĉar ili ja devas ĝenerale pagi la gvidfoliojn kaj la afrankon. En grandaj urboj tiuj elspezoj povas atingi konsiderindan sumon poŝtare. La prospektokolektantoj pripensu tion kaj aldonu respondkuponon kaj ankaŭ la membromarkon de U.E.A., se ili skribas al delegito. — Esperantistoj, kiuj havas rilatojn al komercistoj, montru la jarlibron aŭ adresaron al firmoj kaj instigu ilin, skribi al la reklamantaj firmoj, se la artikloj havas intereson por ili. Nur serioza pritraktado de la reklamoj helpas, enkonduki Esperanton en la komercon, sed la senpripensa agado de prospektokolektantoj grave malutilas nian aferon.

Otto Pilhofer

### Ŝiboletoj

En la Revuo n-ro 663, mi vidis sur paĝo 24 la vorton "ŝiboletojn". Tiun vorton mi ne renkontis en Plena Vortaro nek en ĝia Suplemento. Ĉu vi povas doni tradukon de tiu "ŝiboletojn" ?

M. Belmonte de Abreu

(La vorto troviĝas en la Biblio, trad. Zamenhof : "tiam ili diris al li : Diru : Ŝibolet; li diris : Ŝibolet, ĉar li ne povis elparoli ĝuste..." — Juĝ. 12,6. La vorto estas uzita figure, kun signifo : frazo, kiun oni ripetadas senpense pri ĝia signifo aŭ vereco. — Red.)



## NECESAS IMITI LA PLEJ BONAĴN LANDAĴN INFORMAĴN FAKOĴN

Aliloke en tiu ĉi numero de "Esperanto" ni publikigas la Tabelan Trarigardon pri la atingoj sur la kampo de informado en la jaro 1960. Se oni komparas la ciferojn por la jaro 1960 kun tiuj de la jaro 1959, oni rimarkas regreson en la nombro de publikigitaj artikoloj, prelegoj, radio-prelegoj, ekspozicioj, distribuitaj afiŝoj, flugfolioj kaj broŝuroj. Tio estas sufiĉe komprenebla, se oni konsideras, ke la jaro 1959 estis dediĉita al la memoro de D-ro L. L. Zamenhof kaj ke, rezulte, oni povis doni multe pli da informoj pri la Internacia Lingvo kaj ĝia aŭtoro. La regreso, tamen, estas bedaŭrinda. En 1960 oni ne utiligis sufiĉe la decidon de la Plenuma Komitato de UNESKO celebri la nomon de D-ro Zamenhof, kiu estis deklarita unu el la grandaj personecoj de la homaro. Multaj landaj asocioj ankoraŭ ne havas informajn fakojn. Tial la informado plue restas pli-malpli hazarda, dependa de la bona volo de unuopuloj, kiuj ankoraŭ tro ofte malatentas la fundamentajn ideojn de nia informado kiel ili estas difinitaj en la Principaro de Frostavallen. Ĉi-foje en la dua kolumno de la tabelo troviĝas mencio ĉu en la koncerna lando ekzistas aparta informa fako, aŭ ne. Sufiĉas supraĵe kompari la landojn, en kiuj funkcias aparta informa fako, kun tiuj, en kiuj tia fako aŭ komisiono ne ekzistas, por vidi tuj la grandegan diferencon en la karaktero de informado pri la Internacia Lingvo. Plue, neekzisto de speciala informa fako kaŭzas, ke en tiuj landoj forestas ne nur planita, bone pripensita kaj konvene gvidata informado, sed ankaŭ la kontrolo de la tuta agado en tiu ĉi branĉo estas treege manka. Estas apenaŭ imageble, ke en tuta Britujo, ekzemple, aperis nur 3 artikoloj dum la tuta jaro 1960 ! Tamen, precize tio estas la oficiala komuniko. Male, en landoj kun bone organizitaj informaj fakoj - ekzemple en Brazilo, Danlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Jugoslavio, Norvegujo, Pollando, Svedujo - la informaj fakoj posedas precizajn informojn pri la nombro de publikigitaj artikoloj kaj aliaj agadoj, povas sekvi la efikon de sia laboro, se necese reagi, adapti la informadon al la bezonoj ktp.

La statistika trarigardo estas nekompleta ankaŭ tial, ĉar multaj landaj asocioj ne resendis la demandaron malgraŭ la urĝigoj. El la aliĝintaj landaj asocioj nenian vivosignon donis la Argentina, Japano kaj Maroka. El la nealiĝintaj organizaĵoj nenian respondon donis la Ĉina, Helena, Israela Rumana, Sudazia kaj Venezuelo. Pro la neplenumo de tiu elementa devo la statistiko bedaŭrinde estas manka. Sendube ankaŭ en tiuj landoj estis farita almenaŭ ia laboro kaj estas vere nekompreneble, ke oni ne raportas pri ĝi kaj tiel malutilas al la

tuto. Espereble tio pliboniĝos en la estonteco.

Pro la menciitaj kaŭzoj la ciferoj en la tabelo trarigardo devas esti konsiderataj kiel minimumaj.

### *Imitu la plej bonajn*

La laboro de la Informa Fako de U.E.A. estas tiel konata, ke ŝajnas superflue ripeti la sciigojn pri ĝiaj organizo, kunlaborantoj, bultenoj. Koncizaj informoj pri la agado de la I.F. de U.E.A. en la jaro 1960/1961 aperos en la Estrara raporto kaj estus tre utile, se ĉiuj organoj de la landaj organizaĵoj kaj lokaj grupoj trastudus almenaŭ tiun parton de la raporto plej atente. Anstataŭe, ni publikigas sube eltiraĵojn el akompanaj raporto de kelkaj bone organizitaj landaj informaj fakoj, por ke la aliaj laŭ la ebleco sekvu ilian ekzemplon.

S-ro Sven Ziegler, kiu respondecas pri la Informa Servo de la Dana Asocio, skribas interalie: "Estas tute nature, ke la klopodoj enkadre de la Lerneja Kampanjo respeguliĝas ankaŭ en la agado de la I.S. rilate la gazetaron. Preskaŭ unu triono de la sumo de artikoloj kaj informoj aperintaj en la gazetaro temas pri la Kampanjo kaj kelkaj ĝiaj atingoj . . . . La ciferoj de la jaro evidentigas, ke la rezultoj estas tute kontentigaj. Dum la jaro ni dissendis 15 dokumentojn kun entute 31 paĝoj en la suma amplekso de 2.128 ekzempleroj. Al tio aldonu la dokumentojn de la Lerneja Kampanjo. Rezulte de tiu ĉi laboro alvenis 622 artikoloj kaj informoj aperintaj en la gazetaro. Mi havis la okazon respondi en kelkaj kazoj al misprezentaj artikoloj de kelkaj gazetoj. La artikoloj kontraŭaj al Esperanto estas treege malmultaj, entute, laŭ mia scio, nur 23. Bedaŭrinde oni devas konstati, ke kelkfoje misprezentis ne la bonfidaj ĵurnalistoj, sed eĉ altrangaj funkciuloj de la Movado".

En *Francujo* pluraj personoj okupiĝas pri informado. S-ro Ribot kun pliaj 4 personoj estas ŝarĝita pri la agado en la edukaj medioj, dum speciala Komitato por Informado agas nun ĉe ĉiuj aliaj instancoj. La gazetara servo de UEF sendas regule artikolojn kaj informojn al la franca gazetaro. Aparte, s-ro Giloteaux sendas artikolojn al la gazetoj de Lille. Fine, s-ro Delaire havas sian propran gazetaran servon. Aparte rimarkinda estas la laboro de s-ro Ribot, kiu faris 147 prelegojn en la lernejoj antaŭ ĉ. 12.000 gelernantoj, dum s-ro Delaire donis 50 lecionojn de Esperanto ĉe la franca radio.

Rimarkindan progreson faris la Informa Fako de Germana Esperanto Asocio, kiun nun gvidas s-ro B. Zenker. En sia akompana raporto li skribis: "Por ricevi kiel eble plej kompletan bildon pri la laboro farita dum la pasinta jaro, GEA Estraro decidis multobligi vian demandaron por disdono al la grupoj kaj ligoj. Ni forsendis proksimume 110



**TABELA TRARIGARDO PRI LA INFORMA LABORO EN 1960**

| Landa Asocio<br>aŭ teritorio | Adreso de la Informa Fakoj<br>aŭ kunlaboranto                                         | Nombro de      |               | Prelegoj    |                 | Radio<br>prele-<br>goj | Ekspozicioj |                 | Distrib.<br>afiŝoj,<br>flugfolioj,<br>broŝuroj | Ĉu la intere-<br>sigo pri Esp.<br>kreskis? |
|------------------------------|---------------------------------------------------------------------------------------|----------------|---------------|-------------|-----------------|------------------------|-------------|-----------------|------------------------------------------------|--------------------------------------------|
|                              |                                                                                       | arti-<br>koloj | infor-<br>moj | nom-<br>bro | ĉees-<br>tintoj |                        | nom-<br>bro | ĉees-<br>tintoj |                                                |                                            |
| Aŭstralia                    | Sen fakoj; s-ino Ruth Mc-<br>Grath, 41 Reynolds Rd. Mount<br>Pleasant                 | 26             | 26            | 24          | 1.200           | 19                     | 3           | 2.100           | 600                                            | Kreskis                                    |
| Aŭstria                      | Fakoj: s-ro E. Werner, Pil-<br>gramgasse 9/27 Wien, W.                                | 50             | 200           | 1           | 300             | 5                      | 1           | 300             | 4.000                                          | Kresketis                                  |
| Belga                        | Fakoj: s-ro L. De Marré, 232,<br>av. Groenendael, Antwerpen                           | 15             | 25            | 4           | 250             | 2                      | 1           | 1.500           | 3.200                                          | Sama                                       |
| Brazila                      | Fakoj: Prof. D-ro Carlos<br>Domingues, Rua Alvaro Al-<br>vim 37, Rio de Janeiro       | 1.400          | 3.000         | 200         | 17.000          | 260                    | 15          | 45.000          | 30.000                                         | Sama                                       |
| Brita                        | Sen fakoj: BEA, 140 Holland<br>Park Av., London                                       | 3              | 180           | 40          | 1.600           | 3                      | —           | —               | 7.000                                          | Kreskis                                    |
| Bulgara                      | Fakoj: s-ro Krastju Karucin,<br>102, Bulv. "Hristo Botev",<br>Sofia                   | 34             | 33            | 32          | 5.000           | 3                      | 32          | 6.000           | 30.000                                         | Kreskis                                    |
| Ĉeĥoslovaka                  | Sen fakoj: Ĉeĥoslovaka E.<br>Komitato                                                 | 32             | 30            | 24          | 1.000           | 3                      | 14          | 1.500           | 3.000                                          | Iom mal-<br>kreskis                        |
| Dana                         | Fakoj: s-ro Sven Ziegler,<br>Jølbyvej 9 B, Vanløse Køben-<br>havn                     | 121            | 501           | —           | —               | 9                      | —           | —               | 1.800                                          | Modesta<br>kresko                          |
| Finna                        | Kunlab.: V. Setälä 4, Espe-<br>rantotie, Matinkylä, Helsinki                          | 20             | 80            | 10          | 1.000           | —                      | 1           | 5.000           | 8.000                                          | Kreskis<br>kaŭze de<br>Z. Jaro             |
| Franca                       | Fakoj: s-ro Rougetet, 73 ter<br>Av. Maréchal Foch, St. Ger-<br>main en Laye (S. & O.) | 200            | 223           | 161         | 14.000          | 11                     | 6           | 25.000          | 10.000                                         | Kreskis                                    |
| Germana                      | Fakoj: s-ro B. Zenker, Ram-<br>saystr. 15, (16) Hanau/Main                            | 524            | 788           | 57          | 3.200           | 23                     | 26          | 6.000           | 16.200                                         | Iom<br>kreskis                             |
| Hinda                        | Kunlab.: s-ino M. Haudebine                                                           | 4              | —             | 4           | 200             | —                      | 1           | ?               | 1.000                                          | Iom<br>kreskis                             |
| Hispana                      | Sen fakoj: HEF, Marques de<br>Caro, 6, Valencia                                       | 23             | 35            | 13          | 2.000           | 16                     | 3           | 3.000           | 5.000                                          | Sama                                       |
| Hungara                      | Sen fakoj: HEA, Pf. 147, Bu-<br>dapest 4                                              | 200            | 100           | 50          | 2.000           | 2                      | 30          | 3.000           | —                                              | Konstante<br>kreskas                       |
| Islanda                      | Sen fakoj: s-ro Baldur Rag-<br>narsson, Álfhólsvegur 42, Kó-<br>pavogur               | 3              | 40            | —           | —               | —                      | —           | —               | —                                              | Sama                                       |
| Itala                        | Fakoj: s-ro R. Pennazio, In-<br>form-oficejo de IEF, Cas.<br>post. 248, Torino        | 406            | 800           | 120         | 10.000          | 66                     | 22          | 53.000          | 83.100                                         | Ege<br>kreskis                             |
| Jugoslavia                   | Fakoj: nun s-ro B. M. Rada-<br>ković, "Motorevija", Beograd,<br>Ruzveltova 18/II      | 300            | 150           | 32          | 6.000           | 70                     | 15          | 35.000          | 8.500                                          | Kreskis                                    |
| Kanada                       | Fakoj: s-ro R. Eicholz, P. Box<br>344, Oakville, Ont.                                 | 6              | 10            | 5           | 120             | 6                      | 5           | 400             | 1.100                                          | Sama                                       |



**TABELA TRARIGARDO PRI LA INFORMA LABORO EN 1960**

| Landa Asocio<br>aŭ teritorio | Adreso de la Informa Fakoj<br>aŭ kunlaboranto                                             | Nombro de      |               | Prelegoj    |                 | Radio<br>prele-<br>goj | Ekspozicioj |                 | Distrib.<br>afiŝoj,<br>flugfolioj,<br>broŝuroj | Ĉu la intere-<br>siĝo pri Esp.<br>kreskis? |
|------------------------------|-------------------------------------------------------------------------------------------|----------------|---------------|-------------|-----------------|------------------------|-------------|-----------------|------------------------------------------------|--------------------------------------------|
|                              |                                                                                           | arti-<br>koloj | infor-<br>moj | nom-<br>bro | ĉees-<br>tintoj |                        | nom-<br>bro | ĉees-<br>tintoj |                                                |                                            |
| Madagaskara                  | Sen fakoj : s-ro H. Rousseau,<br>BP 730, Tananarive                                       | 4              | —             | 1           | 80              | 6                      | —           | —               | 50                                             | Kreskis                                    |
| Monaka                       | Kunlab. : s-ro J. J. Derks,<br>6 bis Bd. d'Italie, Monte Carlo                            | 6              | 20            | —           | —               | 1                      | —           | —               | 400                                            | Kreskis                                    |
| Nederlanda                   | Sen fakoj : NEA "L.E.E.N."                                                                | 20             | 170           | —           | —               | —                      | —           | —               | —                                              | Sama                                       |
| Norvega                      | Fakoj : s-ro L. Anjer, Boks<br>942, Oslo                                                  | 46             | 657           | 7           | 250             | 1                      | 2           | ?               | 5.600                                          | Iom<br>kreskis                             |
| Novzelanda                   | Sen fakoj : NZEA P.O. Box 181,<br>Upper Hutt                                              | ?              | 260           | 30          | ?               | 11                     | 3           | ?               | 1.000                                          | ?                                          |
| Pollanda                     | Fakoj : Centra Informoficejo,<br>J. Uspienski, ul. Gałczyńs-<br>kiego 10 m 7, Warszawa 12 | 58             | 830           | 28          | 4.200           | 28                     | 6           | 4.000           | 12.000                                         | Kreskis                                    |
| Soveta Unio                  | Informis I. Sergejev, Levitana<br>1/40 - 196, Moskvo D/80                                 | 400            | 200           | 100         | 10.000          | 45                     | 70          | 12.000          | 30.000                                         | Rimar-<br>kinde<br>kreskis                 |
| Sveda                        | Fakoj : s-ro Jan Strönnne, Ami-<br>ralsgatan 36, Malmö                                    | 324            | 671           | 253         | 13.300          | —                      | —           | 170.000         | 23.500                                         | Kreskis                                    |
| Svisa                        | Fakoj : D-ro A. Baur, Hang-<br>weg 57, Liebefeld                                          | 20             | 150           | 9           | 350             | 3                      | 6           | 250             | 4.000                                          | Sama                                       |
| Sudafrika                    | Informis : E. W. Woodruff,<br>P.O. Box 3293, Johannesburg                                 | 8              | 10            | 4           | 100             | 5                      | 2           | 8.500           | 3.500                                          | Kreskis                                    |
| Urugvaja                     | Fakoj : s-ro R. A. Barbieri,<br>Rio Branco 1556, Ap. 601<br>Montevideo                    | 3              | 20            | 2           | 80              | 21                     | 1           | ?               | 500                                            | Stagnas                                    |
| Usona                        | Fakoj : S-ino Lee Gibson P.O.<br>Box 407, Riverdale California                            | 45             | 60            | 150         | 750             | 50                     | 20          | 40.000          | 20.000                                         | Kreskis                                    |
| 30 respondoj                 | ENTUTE                                                                                    | 4.301          | 9.269         | 1.361       | 93.980          | 669                    | 288         | 421.550         | 313.050                                        | Kreskis                                    |
| 31 respondoj                 | Komparaj ciferoj por la j.<br>1959                                                        | 5.307          | 9.313         | 1.383       | 126.660         | 3.177                  | 242         | 375.350         | 442.000                                        | Kreskis                                    |

ekzemplerojn al niaj unuigoj. Revenis ĝis hodiaŭ 50, tio estas ankoraŭ ne 50% de niaj grupoj respondis. Mia raporto sekve ne povas doni kompletan bildon, ĉar ĝi nur povas liveri statistikon pri duono de ĉiuj niaj suborganizoj. Tamen, mi opinias, ke la bildo ne tro ŝanĝiĝos, ĉar sendube la grupoj, kiuj ne respondis, atestis per tio sian neaktivecon". S-ro Zenker poste ricevis pliajn informojn kaj kompletigis sian raporton, tiel ke la ciferoj pri Germanujo apartenas al la grupo de la plej precizaj.

La Itala Informoficejo, gvidata bonege jam plurajn jarojn de s-ro Pennazio, plue restas imitinda modelo. Ĝia daŭra progresado estas rezulto ne nur

de konstanta prizorgado kaj eltrovado de novaj metodoj de informado, sed ankaŭ de bonintenca kuraĝa kritiko de ĉio kritikinda. Tiurilate s-ro Pennazio skribis : "La situacio de la Esperanto-Movado en Italujo, post la fino de la deka jaro de agado de la Informa Fakoj organizita laŭ modernaj principoj, havas nun karakterizojn tute apartajn, kaj en kelkaj kazoj strangajn : temas pri fakto, ke iuj neesperantistaj medioj ofte laboras pli aktive favore al nia afero, ol la esperantistaj. Ĉiam pli ofte okazas, ke asocioj - precipe kulturaj - petas nin pri informoj, kursoj aŭ proponas kunlaboron". Rilate la pozitivan flankon de agado s-ro Pennazio raportis : "El la 1.206 artikoloj kaj informoj multaj tuŝ-



is apudajn interesajn temojn. Ekzemple en 183 kazoj oni parolis pri UNESKO kaj UN en ligo kun la Esperanto-Movado aŭ la Internacia Lingvo. Cent artikoloj pritraktis la universalajn kongresojn kaj 99 la landajn kongresojn: 9 artikoloj temis pri la Eŭropa federalismo en ligo kun la neceso de la Internacia Lingvo. La forpaso de nia neforgesebla Prof. Canuto kaŭzis la publikigon de 36 artikoloj, en kiuj oni prezentis ankaŭ la esperantistan agadon de nia mortinta Prezidanto . . . . . La Informoficejo aranĝis manifestaciojn ankaŭ en urboj, kie ne ekzistas organizita Esperanto-Movado kaj rezulte fondiĝis novaj grupoj aŭ komenciĝis novaj kursoj en Venezia, Chianciano, Bassano del Grappa, La Spezia, S. Stefano M., Carpi, Romagnano Sesia, Parona Veronese, Ascoli Piceno, Ghilarza, Bondeno ktp. Klopodoj por havi novajn Esperanto-stratojn estis sukcesaj, ĉar nun ni havas en Italujo 15 Esperanto-stratojn. Menciindaj plue estas la pliaj 214 artikoloj aperintaj rezulte de la konata decido de UNESKO pri Zamenhof".

La Informa Fakto de *Jugoslavia Esperanto-Ligo*, kiun dum multaj jaroj efike gvidis s-ro M. Gjivoje kaj nun gvidas s-ro B. M. Radaković, akcentis, ke la cirkonstancoj koncerne Esperanton estas tre malsamaj en Jugoslavio kompare kun iuj landoj, "kie nenio pri Esperanto estas aŭdebla". La raporto daŭrigas: "La unua paŝo kiun entreprenis la Komisiono por Informado kaj Dokumentado estis kontakto kun la ŝtata informa agentejo "TAN-JUG". Krome, ekzistas objektivaj kaŭzoj, kiuj nin certigas, ke pere de radio-stacioj ni povos dum la kuranta jaro fari multe pli informante la aŭskultantojn pri Esperanto kaj pri ĝia praktika apliko. Dum la pasinta jaro ni sukcesis eniri en iun el la plej interesaj programoj, kiujn komune disaŭdigas Beograd kaj Zagreb. Te-

mas pri la t.n. "Amuza Vespero", kiun regule aŭskultas milionoj da homoj . . . . Al ni ŝajnas, ke ti-aspeca agado altiras la atenton, ĉar, almenaŭ en Jugoslavio, ĝi montriĝas bonega. Ni substrekas, ke la propagando kaj informado pri Esperanto devas esti farata ne en formo de ia mistera komunikado, sed en tiu de tute normala ĉiutagaĵo . . . . . La ĉefa vojo en la informado ĉe ni estas kaj devas esti la ŝtata informa servo, al kiu ni donas niajn novaĵojn atente kaj saĝe elektitajn."

Tre solidaj informaj faktoj estas tiuj de la *Norvega Esperantista Ligo*, *Pola Esperanto-Asocio* kaj *Sveda Esperanto-Federacio*. La Norvega Informa Fakto eldonas la gazeton "Esperanto-NYTT" en 10.000 ekzempleroj, regule senditaj ĉefe al la lernejoj. La Pola Centra Informoficejo enpenetris, interalie, en la televidon. Ankaŭ la Sveda Informa Fakto interalie eldonas bonegan informilon "Esperanto-NYTT", kiu akiras ĉiam pli kaj pli da abonantoj.

La Jugoslavia Komisiono petis la I.F. de U.E.A. komuniki okaze en iu cirkulero al la landaj informaj faktoj, ke ĝi estas preta interŝanĝi la spertojn kun la informaj faktoj de ĉiuj landaj asocioj. Anstataŭ en cirkulero, la I.F. de U.E.A. publikigas ĉi tie tiun peton kaj siavice varme rekomendas al ĉiuj landaj asocioj interŝanĝi la spertojn kaj imiti la plei bonajn landajn informajn faktojn en la intereso de ĝenerala altigo de la nivelo de la informado pri la Internacia Lingvo. La reprezentantoj de la informaj faktoj, diversaj kunlaborantoj de la I.F. de U.E.A. kaj la senditoj de landaj asocioj sen informaj faktoj havos la okazon interŝanĝi siajn spertojn kaj pridiskuti la tutan problemaron de la informado ankaŭ dum speciala kunveno okaze de la Universala Kongreso en Harrogate.

I.L.



## LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al:  
Heinrich Reiter, Altmannsdorferstr. 90;  
Wien XII, Aŭstrujo.

### JARĈEFKUNVENO DE GERMANA ESPERANTO-JUNULARO

En la kadro de la 39a Germana Esperanto-Kongreso, Pentekoston en Bad Hersfeld, okazis la ĉi-jara ĉefkunveno de Germana Esperanto-Junularo. Enkonduke la ĝisnuna prezidanto Richard Reuchlin donis ampleksan raporton pri la agado de G.E.J. dum la pasinta jaro: sekvante sian tradicion G.E.J. aranĝis la 4an Internacian Seminarion pri Latinamerikaj Problemoj

en Oldenburg (Oldb) kaj la 6an Internacian Junularkunvenon sur Feldberg (Nigra Arbaro). Por tiuj ĉi renkontiĝoj kaj por la partopreno de siaj membroj en la kongresoj de Rotterdam kaj Bruselo G.E.J. ricevis konsiderindan ŝtatan subvencion.

La novelektoj havis jenan rezulton: Uwe Joachim Moritz (unua prezidanto), Dieter Meiners (dua prezidanto), Bruno Knapstein (administranto), Eliza Weide kaj Annemarie Rüter

(gvidantinoj de la Informa Fakto).

La plej grava programpunkto de la jarĉefkunveno estis la diskutado pri la sekvantaj labor-plano. G.E.J. plintensigos la propagandon de Esperanto en junularaj medioj. La ĉefa projekto en la kadro de la Junulara Kampanjo estas la KONCENTRATA VARBADO en lernejoj kaj junulargrupoj de Hamburgo. Tiucele la estraro de Germana Esperanto-Asocio disponigis 1000 GM kiel subvencion!!! La venonta internacia renkontiĝo, kiun organizas G.E.J., estas la 5a Internacia Seminario en Köln de la 27a de decembro 1961 ĝis la 1a de januaro 1962 pri la temo "Usono kaj Soveta Unio — Ĉu eblas kunekzistado de la du kontraŭaj socisistemoj?" Prelegos Prof. D-ro Ivo Lapenna (London) kaj Prof. Lucien Laurat (Paris).

La nova adreso de G.E.J. estas: Uwe Joachim Moritz, Am Fastungsgraben 53, Oldenburg (Oldb), Germanujo.



## IMITINDA INICIATO

Ciam kaj ĉie en la Esperanto-Movado oni aŭdas la plendon ke mankas mono, ke mirindaj aferoj estus fareblaj se nur ni disponus pri mono, se ni ricevus subvenciojn, donacojn aŭ heredaĵojn. Tute prave.

Sed kelkfoje oni renkontas personojn, kiuj ne nur konstatas tiun fakton, sed entreprenas ion konkretan por ŝanĝi tiun situacion. Tiaj personoj estas Gesinjoroj Emanuel kaj Greta Kull en Korsnäs, Svedujo. Antaŭ kelkaj semajnoj ili sendis al U.E.A. la sumon de 1000 svedaj kronoj (2776 steloj). Tiun sumon ili enspezis per loterio, kiun ili aranĝis en sia urbo. Ion similan ili entreprenis jam plurajn fojojn en la lastaj jaroj.

Per la nuna loterio Ges. Kull havigis al la Esperanto-Movado ne malpli ol 15.000 sv. kr. (41.640 steloj), kiun sumon ili dividis inter la loka, regiona landa kaj internacia Esperanto-instancoj.

Gesinjoroj Kull meritas nian grandan dankon pro sia sinofera laborado. Certe la plej bela rekompenco por ili estus grandskala imitado de ilia ekzemplo en la tuta mondo. Tiun rekompencon ili ricevu!



Ges. Kull en la kiosko sur granda placo en sia urbo, kiun ili luis por vendi la lotojn.

## La poŝtmarkkolektado

Statistiko la 1-an de junio:  
8000 steloj = 2000 guldenoj. Sendu daŭre viajn poŝtmarkojn al  
Peter Zacho, Randbølvej 4,  
Kopenhago F., Danlando

## 39a GERMANA ESPERANTO-KONGRESO EN BAD HERSFELD

Sub la honora protektado de la Ministroprezidanto de Heslando. D-ro Georg-August Zinn, okazis la 39a Germana Esperanto-Kongreso dum Pentekosto en la pitoreska urbo Bad Hersfeld, en kies stratoj flirtis multaj urbaj kaj Esperantaj flagoj.

La kongreson, kiun partoprenis 200 delegitoj de la Germana Esperanto-Asocio, komencis sabaton, la 20an de majo, gazetarkonferenco en la kongresejo "Zunftthaus" kaj akcepto de la urbestro D-ro Jansen por la Estraro de G.E.A. kaj la eksterlandaj gastoj en la urbodomo. La Jarĉefkunveno de G.E.A. elektis D-ron Wilhelm Herrmann, Lampertheim/Hessen, kiel novan prezidanton de G.E.A., kiu dimanĉon, la 21an de majo, dum la publika kongresa soleno en la festsalono de la nova kuracdomo paroladis pri la temo "Lingvo — Politiko — Kulturo". Antaŭe okazis evangelia kaj katolika diservoj en Esperanto, la dua en ĉeesto de multaj neesperantistaj katolikoj. London, la 22an de majo, la laborkunsido de G.E.A. pri "Esperanto kaj la Junularo" decidis programon por plintensigo de la varbado en lernejoj, universitatoj kaj junularaj asocioj.

Aliaj aranĝoj estis la Jarĉefkunveno de la Germana Esperanto-Junularo, kiu elektis s-ron Uwe Joachim Moritz, Oldenburg/Oldb., kiel novan prezidanton de G.E.J., fakkunsidoj, balo, ekskurso kaj adiaŭa vespero.

Radio kaj gazetaro raportis detale kaj favore pri la kongreso, kiu en la venonta jaro okazos dum Pentekosto

en Oberkirch/Baden, situanta 30 km oriente de Strasbourg.

R. R.

## NOVA ESPERANTO-KLUBO DE NOV-JORKO

Laŭ la iniciato de d-ro Julius Balbin dum la lasta vintro fondiĝis nova "ESPERANTO-KLUBO DE NOV-JORKO" kunigante la plejmulton de la spertaj kaj spertigemaj gesanoj de la tuta metropolo Nov-Jorka. La anaro de la klubo estas supozeble la plej diversnacia en la mondo; en la kunvenoj nur Esperanto estas uzata. Laŭ la speciala permeso de la personarestro de UNO, la UNO-Esperanto-Klubo ofte havas komunan kunvenon kun la Esperanto-Klubo de Nov-Jorko en la UNO Palaco mem.

D-ro Balbin, Prezidanto de la Klubo, havas tre viglajn kunestraranojn en la personoj de s-o Joel Silverman. Sekretario-Raportisto, de f-ino Marie Vandenhende, Kasistino, de f-ino Françoise Globa, Reprezentantino ĉe UNO, kaj de Ralph R. Bonesper, kies funkcio estas reprezenti la klubon ĉe internaciaj esperantaj organizaĵoj.


La klubo celas kunigi ĉiujn esperantistojn de la metropolo surbaze de libera, neŭtrala forumo, kie ili povu esprimi siajn personajn opiniojn kaj vidpunktojn rilate al problemoj de la nuntempa mondo kaj al la rolo de la Internacia Lingvo en ilia solvo. La klubo aspiras iĝi unu el centroj elradiontaj esperantan penson kaj inspiron tra tuta Nord-Ameriko.



Ciujare en decembro — jam de naŭ jaroj — la esperantistaj lernantoj en Ranelagh Lernejo (Paul's Road, Ipswich, Suffolk, Anglujo) okazigas Internacian Kandel-feston, al kiu sendas kandelojn lernejoj en ĉiuj mondpartoj. Nia foto montras plakon, kiun oni faris el la kandelrestaĵoj de la unua kandelfesto. Ĝi enhavas kandelvakson de 40 lernejoj en 17 landoj!



# ESPERANTOLOGIO II/2 APEROS



La dua kajero de la dua volumo de *Esperantologio* aperos en julio ĉi-jare kun novaj artikoloj treege interesaj pri la lingvistiko kaj bibliografio de la internacia lingvo. Tiu elstara lingvista organo de nia kulturo, kiun devus aboni ĉiu klubo kaj ĉiu serioza esperantisto en la mondo, aperas per kajeroj 50—80-paĝaj, formantaj volumojn 250—300-paĝajn. La kajeroj estas eldonataj laŭ la cirkonstancoj, unu volumo kovranta 3 aŭ 4 jarojn. Jen sekvas listo de perantoj kaj abonprezoj. Kie ĉe lando ne estas indikita kotizo, validas la baza kotizo, kiu estas por la dua volumo 6 us. dol. Novaj abonantoj povos aĉeti la unuan volumon por *nur* 5/7 de la prezo de la dua volumo (por 5 us. dol. laŭ la baza kotizo), sed oni konsilas, ke ili mendu la unuan volumon absolute *kiel eble plej baldaŭ*, ĉar nur restas kelkdekoj da ekzempleroj de tiu volumo.

**Aŭstrujo** (130 ŝ.): D-ro Hermann Ölberg, Institut für Sprachwissenschaft, Universität Innsbruck, Innsbruck.

**Belgujo** (250 b.fr.): F-ino E. van der Weken, Cuylistsstraat 119, Antwerpen.

**Brazilo**: Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República 54-I, Rio de Janeiro.

**Britujo** (35 sh): S-ino M. C. Major, 1, Pembroke Square, London W. 2.

**Ĉeĥoslovakujo**: Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, Blanická 4, Praha 12.

**Danlando** (35 d.kr.): Administracio de Esperantologio, s-ro E. Svane, Lindegårdsvej 28 C, Kopenhago-Chl.

**Finnlando** (1700 m): S-ro K. Jokinen, Pajupillintie 26.B.13, Etelä-Kaarela, Helsinki.

**Francujo** (25 N.F.): Sennacieca Asocio Tutmonda, Avenue Gambetta 67, Paris 20.

**Germanujo** (22 DM): S-ro Helmut Rössler, Zeppelinstr. 3, (22 b) Speyer.

**Hispanujo** (300 ps): S-ro V. Hernandez Lluzera, Avenida Ejército Español 59, Sabadell.

**Italujo** (3200 l): Prof. Corrado Cerri, Casella Postale 159, Biella (Vercelli).

**Japanujo** (1800 y): S-ro Waseda Yutaka, Syowaku Kawanayama 93, Nagoya.

**Jugoslavio**: Slovenia Esperanto-Ligo, Miklošičeva 7, Ljubljana.

**Nederlando** (18 gld.): S-ro C. van Essen, Floretstraat 10, Rotterdam 25.

**Norvegujo** (35 n.kr.): S-ro Olav Rygg, Magnafaret 15 F, Manglerud.

**Pollando**: Pola Esperanto-Asocio, Ul. Nowy Swiat 27, Warszawa.

**Portugalujo** (150 esc.): S-ro A. P. da Silva, Rua António Ferreira 9-3º. E, Lisbona 5.

**Svedujo** (27,10 sv.kr.): Eldona Societo Esperanto, Box 7043, Malmö 7.

**Svislando** (22 sv. fr.): S-ro Otto Walder, Waldmannstr. 10, Romanshorn.

**Usono kaj Kanado** (6 dol.): S-ro R. C. Marble, P.O. Box 545, Reseda, California.

**Cetere ĉiuj landoj**: Universala Esperanto-Asocio, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

## LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1961

Stato je la 31-a de majo


### Konkurso I

|     | Lando      | Kvoto | Poentoj | %     |
|-----|------------|-------|---------|-------|
| 1.  | Finnlando  | 2515  | 2425    | 96,42 |
| 2.  | Britujo    | 6688  | 6249    | 93,44 |
| 3.  | Hispanujo  | 2585  | 2242    | 86,73 |
| 4.  | Germanujo  | 7490  | 6470    | 86,38 |
| 5.  | Belgujo    | 2121  | 1824    | 86,—  |
| 6.  | Italujo    | 4247  | 3630    | 85,47 |
| 7.  | Svislando  | 2120  | 1790    | 84,43 |
| 8.  | Usono      | 3660  | 3060    | 83,61 |
| 9.  | Nederlando | 5716  | 4777    | 83,57 |
| 10. | Svedujo    | 6325  | 5275    | 83,40 |
| 11. | Norvegujo  | 1993  | 1602    | 80,38 |
| 12. | Francujo   | 7516  | 5761    | 76,65 |
| 13. | Danlando   | 3002  | 2098    | 69,89 |
| 14. | Japanujo   | 2860  | 1875    | 65,56 |
| 15. | Brazilo    | 5100  | 3148    | 61,73 |
| 16. | Jugoslavio | 7150  | 1560    | 21,82 |

### Konkurso II

|     | Lando       | Kvoto | Poentoj | %     |
|-----|-------------|-------|---------|-------|
| 1.  | Novzelando  | 965   | 954     | 98,86 |
| 2.  | Kanado      | 665   | 635     | 95,49 |
| 3.  | Aŭstrujo    | 1580  | 1430    | 90,51 |
| 4.  | Portugalujo | 535   | 475     | 88,79 |
| 5.  | Israelo     | 250   | 210     | 84,—  |
| 6.  | Madagaskaro | 250   | 205     | 82,—  |
| 7.  | Aŭstralio   | 1146  | 800     | 69,81 |
| 8.  | Islando     | 250   | 125     | 50,—  |
| 9.  | Sudafriko   | 375   | 160     | 42,67 |
| 10. | Argentino   | 960   | 395     | 42,15 |
| 11. | Urugvajo    | 250   | 95      | 38,—  |





Hungara Esperanto Asocio aranĝis kunvenon de la "Veteranaj Esperantistoj", al kiu venis 150 veteranoj. La festo bonege sukcesis. Jen ni vidas (de supre malsupren): — (1) Parolas Frederiko Nemes, Ĉefsekretario de HEA. Apud li, J. Baghy, K. Kalocsay kaj Borbala T. Szeremi; en la dua vico, Anna Ruzsits kaj Ludoviko Kökény. (2) Parto de la ĉeestantaro. (3) Michaelo Sárosi kantas, akompanante sin per gitaro. (4) Ĉirkaŭ la tablo sidas Kalocsay, Baghy, Kökény, Ludoviko Tárkony, Mátéffy, kaj Maria Kenesei. Staras: Flora Lúsánszky, T.P. Nolísa, Vilhelmo Lusanszky kaj Federiko Nemes.

## Argentino

- En la Instituto de Moderna Filologio de la Beletristika Fakultato apartenanta al la Nacia Universitato Litoral (Rosario) oni oficialigis la instruadon de Esperanto. Ekde ĉi tiu jaro oni instruas en du kursoj: unu elementa kaj unu perfektiga.


- En la Norma Lernejo de Rafaela Esperanto estas enkondukita kiel deviga objekto por lernantoj de la 5a klaso.

- En la provinco Santa Fé la Ministerio de Edukado elektis la 15an de septembro kiel Tagon de Esperanto por la Lerneja Kalendaro. Tio signifas, ke en tiu tago en ĉiuj 1.100 lernejoj de la provinco oni devas fari memorigan lecionon. Dum la pasinta jaro Argentina Ligo de Esperanto liveris la materialon necesan al la Ministerio, kiu distribuis ĝin al ĉiuj lernejoj. Por la nuna jaro oni pretigas novan materialon.

## Ĉeĥoslovakio

- "Juna Mondo", ŝatata ĵurnalo de Ĉeĥoslovakia junularo, aperigis grandan artikolon pri Esperanto sub titolo "Pri unu el vojaĝoj de amikeco kaj paco". La artikolo pritraktis interalie la aŭtoron de Esperanto, kaj emfazis, ke multaj ĉeĥaj libroj estas eldonitaj japanlingve ĉinlingve nur dank' al esperantistaj tradukoj.

- IIIa Internacia Foiro en Brno okazos de la 10a ĝis la 24a de septembro. Temos precipe pri fabrikaĵoj maŝinaj kaj metalurgiaj, ne nur el landoj socialismaj, sed ankaŭ el kapitalismaj.



Eksterlandaj esperantistoj povas ricevi invitolon de la Foira oficejo en Brno, Výstaviště 1, kaj pere de la esperantista klubo en Brno, Rooseweltova 13, ili povas peti pluajn informojn pri vizito al la Foiro.

## Danlando

- Dana libreto en tria eldono. Antaŭ unu jaro la gazetara oficejo de la dana ministerio pri eksterlandaj aferoj eldonis ilustritan libron sub titolo "Kie abundo estas malofte, sed manko pli malofte — Danio". La tuta stoko de 5000 ekz. elĉerpigis en nur unu aŭ du monatoj. Tuj la ministerio decidis fari duan eldonon de 5000 pliaj ekz., kaj nun oni finpreparis eĉ trian eldonon, ĉar ankaŭ la dua eldono estas disdonita. En unu nura jaro la broŝuro do aperis entute per 15000 ekz. Ĉiu intereso, kiu ankoraŭ ne havigis al si la libron, povas peti ĝin, sed nur ĉe la

dana ambasadorejo en sia lando aŭ eventuale en najbara lando; ĉe la danaj ambasadorejoj ĉie en la mondo la broŝuro estas senpage havebla.

## Finnlando

- Esperanto en la scienco. La plej grava scienca instituto, Maxx-Planck-societo por progresigo de sciencoj, intencas fondi internacian centron por scienca informado, kaj ĉe tio sciigis, ke ĝi volas serioze studi la eblecon uzi por koncernaj dokumentoj la internacian lingvon. Pro tio 22 sciencistoj el Finnlando sendis al la Instituto kuraĝigan leteron, opiniante, ke Esperanto plej bone servos por internacia scienca informado. La unuaj subskribintoj estas prof. Paavo Ravila, eksrektorero de la Universitato de Helsinko kaj prof. Yrjö Väisälä, emerita profesoro de astronomio kaj fiziko en la Universitato de Turku (la sama, kiu jam antaŭ jaroj donis al du planedetoj la nomojn "Zamenhof" kaj "Esperanto"); ambaŭ estas membroj de la plej grava kultura instituto de Finnlando, la Akademio de Finnlando. Inter la aliaj subskribintoj estas eksprezidanto de la Scienca Akademio Finna, prof. Vilho Väisälä, direktoroj de fakaj institutoj, profesoroj de finna lingvo, de fonetiko, matematiko, geodezio, internacia juro, filozofio, farmacia kemio, limnologio, rektorero de instruista altlernejo, ktp. Espereble aliĝos simile eminentaj sciencistoj el aliaj landoj al sama deziro. Se iu bezonas, por kolektado de nomoj sub koncerna adreso, li povas ricevi la tekston kaj plenan liston de ĝisnunaj subskriboj el la redakcio de Esperanta Finnlando.

## Franco

- Internaciaj organizaĵoj lernas el la Universalaj Kongresoj. La grava franca organizaĵo CEGOS (Commission Générale pour l'Organisation Scientifique), kiu grupigas 1800 francajn kaj eksterlandajn industriojn, invitis la Konstantan Kongresan Serketarion, s-ro G. C. Fighiera, fari raporton en Parizo pri liaj spertoj koncerne la rilatojn inter Universalaj Kongresoj kaj gazetaro. La raporto de s-ro Fighiera estos sekvata de ĝenerala diskuto inter speciale invitataj specialistoj pri organizado kaj reprezentantoj de la ĉefaj francaj gazetoj kaj telegrafagentoj. En la medio de la internaciaj organizaĵoj komencas montriĝi granda intereso pri la organizaj metodoj de niaj Universalaj Kongresoj.

- La 7an de majo la Esperanto-Federacio "Languedoc-Roussillon" okazigis en la ĉarma urbeto Armissan (Aude) sian regionan kongreson. La regionaj ĵurnaloj "L'Indépendant" kaj "Midi Libre", kiuj sendis raportistojn al la kongreso, aperigis favorajn artikolojn pri ĝi.

## Hispanujo

- Raportoj en la hispana gazetaro. La ĵurnalo "Sabadell" n-ro 2754 de la 29a de aprilo 1961 dediĉis unu kolumnon al raporto pri esperanta prelego pri "La lukto de la nederlandanoj kon-



traŭ la maro" de J. M. Mabesoone, samtempe tradukita en la katalunan de Dr. Mariano Solá. "La Tosca" (Moyá) en sia numero de aprilo 1961 presigis intervjuon kun D-ro Hamvai el Novzelando.

### Hungarujo

● Sub protektado de la Hungara Esperanto Asocio fondiĝis filmkolektivo "Julio Baghy", kiu faros duonhoran kolorfilmon dediĉitan al la VIII-a Tutmonda Festivalo de la Junularo kaj Studentaro, pri la vivo de junaj geesperantistoj. La titolo de la filmo estos: "Kantanta kaj dancanta junularo". Oni petas kontakton kun amatoraj kaj profesiaj film-fotokluboj, ĉe adreso: Budapeŝt 119, Poŝtkesto 6, Hungarujo.

● La Hungara Pionir-Asocio (simila al la junskolta movado) festas nunjare sian 15-jaran agadon. Salutleterojn oni sendu, eventuale kun aldono de konvena infandeseĝnaĵo, al: Hungara Pionir-Asocio, Budapeŝt V., Nádor-u. 28. Ties revuo "Tábortüz" (Tendarfajro) volonte aperigas korespondancetojn de geknaboj en sia rubriko "La poŝto de la amikeco".

● La Hungara Pedagogia Sindikato sendis sciigon al la lernejoj, ke oni aranĝos specialan kurson por geinstruistoj, kiuj en la venonta lernejjaro povos instrui Esperanton. La kurson aranĝos senpage la Hungara Esperanto-Asocio.

### Italujo



*Dum la Va Kunveno de Esperantistaj Grupestroj, okazinta en Milano (Italujo) la 16an de aprilo 1961, parolas la prezidanto de la Milana Esperanto-Grupo, s-ro Felice Bertolletti.*

### Nederlando

● Post la 1-a de junio pendos en la restoraci-vagonoj de Wagons-Lits ŝildo kun la mencio "Menuo en Esperanto havebla" en jenaj trajektoj: Amsterdam-Bruxelles v.v.; Amsterdam-Basel v.v.; Hoek van Holland-Osnabruck-Jeumont v.v.; Hoek van Holland-Kolono v.v.; Hoek van Holland-Grossenbrode v.v.

### Norvegujo

● La orienta distrikto de Norvega Esperantista Ligo invitas al Fiera Semajno de la 6a ĝis la 12a de aŭgusto 1961. Prospekton kaj detalojn sendas Orienta distrikto de N.E.L., Sinsenvn 78, REFSTAD, Oslo.

### Svislando

● Sur la Kormontō (Herzberg) okazos de la 11a ĝis la 17a de septembro la 3a Internacia Feriosemajno, sub patroneco de la Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj. Informojn sendas Hans Hunkeler, poŝtfako 417, Aaraŭ, Svislando.

### ESPERANTISTA VIVO NASKIĜO

**Kaesar.** Internacia paro K. Albrecht kaj Pinjo Kaeser en Düsseldorf, Germanujo, ĝojas anonci la naskiĝon de la unua fileto Carl-Reino Kaeser je la 1-a de aprilo, 1961.

### GEEDZIĜO

**Imbert-Brajčić.** S-ro Roger Imberi (franco) kaj f-ino Nevenka Brajčić (jugoslavino) geedziĝis en Zagreb la 29an de aprilo, 1961.

### NEKROLOGO

**Czubrýnski.** Mortis en Varsovio Honora Membro de UEA D-ro Antoni Czubrýnski.

**Petrov.** Terura bato trafis la 80-jaran pioniron Penko Petrov, esperantisto de post 1900 en Jambol, Bulgarujo, pro la neatendita morto je la 18a de marto, 1961, de lia plej juna filo Nikolaj Petrov en la aĝo de 41 jaroj.

**Yumuk.** Mortis antaŭ iom da tempo s-ro Muharrem Yumuk, meritplena veterano de la turka Esperantomovado, tre konata antaŭ en Bulgarujo, de kiu lando li devenis.



## 46-a Universala Kongreso de Esperanto

Harrogate 5 VIII - 12 VIII 1961 Britujo.

de Harrogate kaj Wokingham al du junuloj ĝis 20 jaroj, kiuj gajnos specialan konkurson.

### Adoptaj gepatroj:

Fariĝis "Adoptaj Gepatroj": Bradforda Esperanto-Societo, Keighley Esperanto-Grupo. La Londona Esperanto-Klubo, S-ino Y. Myers en Poole (ĉiuj el Britujo), F-ino E. Steinman en Bern (Svislando), D-ro W. P. Roelofs en Soest (Nederlando), Klubo Esperantista de Malmö, S-ro R. Linse en Jönköping (Svedujo), Munkena Esperanto-Grupo (Germanujo). Diversajn kontribuojn sendis: Germana Esperanto-Asocio, Asocio de Profesilaborantaj virinoj (Ripon), Virina Konsilantaro (Harrogate). Entute la fondaĵo "Adoptaj Gepatroj" kolektis 143 pundojn. L.K.K. asignis subvencion de 50 pundoj por partopreno de grupo da finnaj infanoj.

### Jugoslava Ensemblo:

L.K.K. invitis la jugoslavan ensemblon "Branko Svetković" el Beograd prezenti en la kadro de la Arta Festivalo spektaklon de jugoslavaj folkloraj

dancoj kaj kantoj. La ensemblo konsistas el 39 ludantoj.

### Libervola Prezento:

La Internacia Arta Teatro anoncas, ke en la kadro de la libervola spektaklo "Modernaj unuaktaj teatraĵoj" ĝi ludos en Esperanto jenajn verkojn: "La homa voĉo" de J. Cocteau, "Maneken-Parado" de M. Boulton kaj "La respektinda p..." de J. P. Sartre.

### Alveno en Harrogate:

Kvankam la unuaj kongresaj programoj komenciĝos nur sabaton posttagmeze, estas konsilinde, ke ĉiuj kongresanoj, kiuj povos tion fari kaj kiuj laŭe rezervis ĉambron en hotelo, alvenu al Harrogate jam dum vendredo, por eviti troan amasiĝon de la afliuo de la kongresanaro. La akceptejo en la stacidomo funkcios ek de vendredo kaj en la kongresejo ĉiu alveninto povos tuj ricevi siajn dokumentojn.

### Frualvenintoj:

Kongresanoj, kiuj atingos Harrogate antaŭ vendredo povos renkonti unu la alian en la speciale organizita renkontejo, la kafeja salono de la Reĝa Banejo (Royal Bath) en Parliament Street.

### Kongresa libro:

La Kongresa Libro estos sendita al ĉiu aliĝinto ek de la fino de junio. Al kongresanoj loĝantaj en ekstereŭropaj kontinentoj la libro ne estos sendita, sed transdonita je alveno en Harrogate.

Korespondadreso: 46-a Universala Kongreso de Esperanto - Harrogate. Telefono: Harrogate 4685.

Telegrafo: Esperanto Harrogate.

Banko: Midland Bank Ltd., Harrogate.

Oficiala Antaŭkongreso kaj Seminario "Oriento-Okcidento" (Londono 2-4 Aŭgusto 1961): S-ro V. Sadler, 1 Poet's Rd., Highbury, London N5 17-a T.E.J.O.-Kongreso (Wokingham 12-19 Aŭgusto 1961): S-ro T. G. Page, 90, Ross Street, Cambridge.

Internacia Geografia Semajno (Leicester 12-19 Aŭgusto 1961) D-ro R. H. Osborne. c/o Dept. of Geography, The University, Nottingham.

### OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 11 Junio 1961  
Stipendioj:

Sveda Esperanto-Junulara Unuiĝo decidis asigni du stipendiojn de 250 sv.kr por partopreno en la Kongreso



**Statistiko :**

(ĝis la fino de majo) : Algerio 2, Argentino 4, Aŭstralio 4, Aŭstrujo 12, Belgujo 39, Brazilo 6, Britujo 512, Bulgarujo 8, Danlando 55, Finnlando 25, Francujo 187, Germanujo 108, Hispanujo 9, Hungarujo 6, Irlando 4, Israelo 4, Italujo 73, Japanujo 5, Jugoslavio 92, Kanado 8, Madagaskaro 2, Maroko 5, Monako 4, Nederlando 80, Norvegujo

11, Novzelando 2, Persujo, 1. Pollando 25, Portugalujo 11, Sudaŝriko 5, Sovetunio 1, Svedujo 92, Svisujo 23, Turkujo 1, Usono 10, Entute 1436 el 35 landoj.

La nuna estas la lasta komuniko : la Kongresa Komitato deziras al ĉiu kongresano bonan vojaĝon al Harrogate.

G. C. Fighiera,  
Konstanta Kongresa Sekretario

# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

la 1-an de junio 1961

N-ro 339

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de majo kaj ankaŭ por komparo je la fino de majo 1960.

|                    | 1960  | 1961  |
|--------------------|-------|-------|
| Asociaj membroj    | 7926  | 8169  |
| Individuaj membroj |       |       |
| MJ                 | 710   | 715   |
| MA                 | 4619  | 4662  |
| MS                 | 528   | 451   |
| Pat.               | 5     | 1     |
| DM                 | 349   | 409   |
| HM                 | 43    | 43    |
| JMJ                | 24    | 26    |
| JMA                | 171   | 6456  |
|                    | 6449  | 149   |
|                    | 14375 | 14625 |

**DELEGITOJ****Bulgarujo**

Asenovgrad D : S-ro A. Gaev, tabak-  
teknikisto, ul. K. Kovačev N.17.

**Danlando**

Ejstrup station (Jylland) D : S-ino B.  
Torbell, dentistino.

FD (dentistaj aferoj) : La D.

**Francujo**

Grenoble (Isère) VD : S-ro J. Dettwil-  
ler, kemi-inĝeniero, 61 Bd. Joseph  
Vallier.

**Hispanujo**

Manlleu (Barcelona) FD (mekaniko) :  
S-ro J. Salvans, mekanikisto, Serrat  
de Mun no. 8.

Olot (Gerona) D : S-ro A. Rodeja  
Molas, direktoro de lernejo, Pl.  
Balmes-Torre.

San Feliu de Guíxols (Costa Brava) D :  
S-ro J. Maset, instruisto, Fernando  
Romaguera 12, aŭ Poŝkeŝto 39.

Sevilla (Sevilla) FD (fervojo) : S-ro J.  
González Rodríguez, fervojisto, Ave-  
nida de Cádiz 8, bajo.

Tortosa (Tarragona) D : S-ro J. Marti-  
nez, agrikulturisto, Barrio Sta. Roas  
No. 55, Bitem.

**Italujo**

Fidenza (Parma) D : S-ro R. Sommi,  
bankoficisto, Piazza Garibaldi 12.

**Meksikio**

Puebla (Puebla) D : S-ro M. Azorin  
Poch, profesoro, Priv. Begonia, 3101,  
Col. Chulavista.

**Nederlando**

Den Haag (Zuid-Holland) FD (turis-  
mo) : S-ino E. Kervers-van Tholen,  
instruistino, 22. Van Slingelandt-  
straat.

**MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1961**

427. Brya, S-ro A. M., Urbana, 428.  
Solin, S-ro P., San Diego, Usono; 429.  
Garcia Blazquez, S-ro F., Caracas, Ve-  
nezuelo; 430. Bevan, S-ro G., Wrexham;  
Britujo; 431. Morton, F-ino H. R., Lon-  
don, Britujo; 432. Rossetti, S-ro R.,  
Bristol, Britujo; 433. Shaw, S-ro F. W.,  
Wistaston, Britujo; 434. Keller, S-ro  
Ad., La Celle-St. Cloud, Francujo; 435.  
Klunder, S-ro W., Burgsteinfurt, Ger-  
manujo; 436. Rizzo, D-ro P., Catania,  
Italujo; 437. Janjic, D-ro F., Zagreb,  
Jugoslavio; 438. Jerković, S-ro Inĝ. B.,  
Beograd, Jugoslavio; 439. Jovanović,  
S-ro Z. M., Niš, Jugoslavio; 440. Maj-  
cenović, S-ro M., Zabno, Jugoslavio;  
441. Pešić, S-ro M., Beli Manastir, Ju-  
goslavio; 442. Salberg, S-ro E.E., Sel-  
ce, Jugoslavio; 443. Vugrinec, D-ro Ž.,  
Slav. Požega, Jugoslavio; 444. Freeth,  
S-ro R., Palmerston, Novzelando; 445.  
Giannini, S-ro W., Zollikerberg, Svis-  
lando; 446. Lewine, S-ro J. L., New  
York, Usono.

**NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ**

Balbin, D-ro J., New York, Usono;  
Vandenhende, F-ino M. J., New  
York, Usono.

**FONDAJO PROF. CANUTO**

Antaŭa stato : 129 MA, 26 MJ, 2 J-MJ  
kaj 1 J-MA.

F-ino G. Fop, S-ro Inĝ. M. Muretti,  
F-ino L. Forneris, S-ino A. Muretti,  
F-ino R. Cullino, S-ro G. Donadoni,  
F-ino M. Casetta, S-ino M. C. Fighie-  
ra, S-ro B. Soldani, F-ino A. Girolidi,  
Ges. G. kaj U. Grattapaglia, F-ino A.

Casetta, S-ro Mantaut, F-ino Pisani,  
Ges. R. kaj M.T. Pennazio. S-ro F.  
Pennacchietti, S-ro M. Copelli, S-ro M.  
Vaio, S-ro B. Giannini, S-ro Dr. Ma-  
rucco, S-ro V. Messina, S-ro D. Fer-  
rero, S-ro G. Perrotto, S-ro G. Beret-  
ta, S-ro Prof. G. Berretta, S-ro Prof.  
G. Varrio, F-ino R. Bianchi, F-ino L.  
Riva, S-ro D-ro V. Canavero, S-ro A.  
Formaggio, S-ro Inĝ. E. Aproso, S-ro  
D-ro C. Borionie, S-ro Adv. S. B. Ra-  
gusa, Delegazione Esperantista Sicilia,  
S-ro F. Giuffrida, S-ro Prof. C. Graz-  
zini, Itala Instituto de Esperanto, S-ro  
L. Dato, S-ro G. Barbieri, F-ino E.  
Cometti, S-ro L. Diverio, S-ino Prof.  
A. M. Ponti, S-ro P. G. Lassare, S-ro  
C. Guida, S-ro Adv. A. Vaona, S-ino  
A. Zina, F-ino M. L. Benelli, S-ro G.  
Franccone, F-ino S. Sogno, F-ino C.  
Smeriglio, S-ro G. Mancina, S-ro A.  
Beltrami, S-ro A. Zoratti, S-ro V. Fos-  
chian, S-ro D-ro U. Stoppoloni, S-ro  
A. Conti, S-ro G. Della Savia, Espe-  
ranto-Grupo Verona, S-ro Prof. G.  
Facchi, F-ino Prof. E. Bordogna, F-ino  
Prof. B. Marinaro, S-ro C. Pierino,  
S-ro R. Varrone, S-ro D-ro F. Volpi,  
S-ro Adv. A. Barbiellini, S-ro F.  
Zacchè, S-ro G. Perini, Grupo Espe-  
rantista Voghera, S-ro G. Carassa,  
S-ro D-ro A. Brizzi, S-ro Inĝ. N. Mes-  
sina, Maura, Fosca, Grupo Esperan-  
tista Modena, S-ino L. Bartolini, S-ro  
F. Poli, Esperanta Grupo Catania, S-ro  
A. Tognetti, S-ro D-ro A. Angeletti,  
Esperanta Grupo Ozieri, S-ro D-ro L.  
Tadolini, ĉiuj en Italujo, pere de  
I.E.F., kune 89 MA, 1 MJ kaj 1 J-MJ.  
Ges. Gamberini, Italujo 1 MJ kaj 1  
J-MJ; Grupo "A. Tellini", Italujo, 1  
MA; Esp. Grupo Como, Italujo, 1 MA;  
S-ro C. Amaudruz, Svislando, 1 MJ;  
S-ro K. Deubler, Germanujo, 1 MA.

Entute : 221 MA, 29 MJ, 4 J-MJ kaj  
1 J-MA.

Ĉiuj kontribuu por membrigi espe-  
rantistojn en nepagipovaj landoj, ho-  
nore al la nobla prezidinto de U.E.A.  
(Vidu dec. no. "Esperanto", 1960).

**FONDAJO ZAMENHOF**

Ataŭa sumo 18.600,77 gld.

S-ro L. Gross, Germanujo, 3,20 gld.;  
S-ro F. Lowitzer, Germanujo, 1,10  
gld.; Ges. Gamberini, Italujo, 1,59 gld.;  
F-ino P. de J., Nederlando, 2,50 gld.;  
S-ro R. Freeth, Novzelando, 2,51 gld.;  
S-ro E. Thawley, Novzelando, 10,06  
gld.; S-ro D. J. Harlow, Usono, 3,60  
gld.

Entute 18.625,33 gld.; je 1.6.61.

Daŭrigu vian kontribuadon por sub-  
teni la plian agadon de la Asocio, por  
firmigi la poziciojn akiritajn dum la  
Zamenhof-Jaro !

**DONACOJ AL A.P.O.**

Esp. Grupo Como, Italujo, 20,— gld.;  
F-ino P. de J., Nederlando, 10,— gld.

**DONACO AL GENERALA KASO**

S-ro S. La Colla, Italujo, 15,— gld.  
Al ĉiuj donancintoj tre koran dan-  
kon.

M. H. Vermaas,  
Direktorino C.O.



## GRAVA AVERTO

Siatempe ni avertis niajn membrojn kontraŭ iu esperantistotrompanto

### KAUFMANN LEOPOLD

el Aŭstrujo.

Ni informas, ke tiu individuo nun estas arestita en Linz, Aŭstrujo. Ĉiuj kiuj pruntis al li monon aŭ alimaniere fariĝis lia viktimo, bonvolu sendi sian plendon kaj postulon en Esperanto kiel eble plej baldaŭ al D-ro Adolf Halbedl, advokato, Bahnstrasse 45, Knittelfeld, Aŭstrujo, nia delegito en tiu urbo, aŭ al S-ro Helmuth Gerbert, Blütenstrasse 3, Linz-Urfahr, Aŭstrujo, nia tiea delegito.

Precipe legantoj en Hispanujo bonvolu atenti ĉi tiun alvokon, ĉar en tiu lando pluraj esperantistoj pruntis monon al la nomita persono.

Dir. C. O.

## ANONCETOJ

**AVERTO:** Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondecas pri la enhavo de la anonceloj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmarkkolektantojn.

**Koresponda Servo de U.E.A. (K.S.M.).** 12, rue des Jacobins.

De novembro 1960 ĝis fino de aprilo 1961 alvenis proksimume 500 korespondpetoj kaj -proponoj. Ĉiuj, kiuj aldonis respondkuponon, ricevis rektan respondon. La adresoj de la aliaj estis transdonitaj laŭ taŭgaj okazoj. Espereble kun sukceso. — Nun kelkaj konsiloj pri la uzado de K.S.M. Se vi deziras rapidan plenumon de via emo al korespondado kun alilandanoj, bonvolu menciigi ne nur unu sed diversajn, tre variajn landojn. el kiuj vi akceptos letergeamikojn. Se ekz. Nordpolusano volas korespondi nepre nur kun frizistino el la lando de la Botokudoj, li ja devos pacienci ĝis iu tia anoncosin. Interparenteze dirite, tiam ŝi nepre volos nur iun el la Suda Poluso. Anstataŭ longe kaj eble eĉ vane atendadi iluziaĵon, ĉu ne estos pli oportune, ke li tuj amikiĝu laŭ disponeblaj proponoj? Ĉie en la mondo troviĝas ja interesaj gekorespondantoj. — Kaj nun iom pri misuzado de K.S.M. Alvenas kelkfoje plendoj pri strangaj proponoj. Korespondi ne signifas negoci, bonvolu do ne tuj komenci postulante alsendon de ĉiuspecaj aĵoj. Unue ĉar tio estas nek ĝentila, nek modesta kaj due, ĉar eĉ en la landoj kun t.n. alta vivnivelo ne ĉiu esperantisto estas iu Rothschild. Viaj senpripensaj postuloj plivere trafos gestudentojn kaj gelaboristojn ol bankestrojn. Krom tio tiaj fuŝagadoj fortimigos novulojn, kiuj ne estas preparitaj por tiaj strangaj, kaj la pacienca laboro de sindonemaj E-instruistoj riskas esti ruinigita. Tamen, same kiel unu hirundo printempon ne alportas, oni nenion

konkludu el unu malbona sperto. Ĉie en la mondo kaj en ĉiuj medioj ekzistas profiteblaj homoj, bedaŭrinde tiurilate, eĉ en Esperantujo ne estas regulo sen escepto. Aliflanke oni komprenu la devon respondi al petitaj korespondantoj, eĉ se nur por informi, ke oni ne deziras daŭrigi la korespondadon.

**Kongresanoj!** Haltu en Dovro! Deĵoros D. Soleo ĉe aŭtopramejo, novbakita samideano (oficiala interpretisto) ĉe marstacidomo, unu semajnon antaŭ kaj post la 46-a.

**Kongresanoj!** Dum via restado en Anglujo vi devus viziti Harlow, la plej faman Novan Urbon de tiu lando. Informa Oficejo: 1 Adam's House, Town Centre (Urba Centro), Harlow, Essex. Esperantista gvidisto ĉeestos je 10.30 a.t.m. ĉiutage de la 14-a ĝis la 19-a de aŭgusto.

**Goslar.** Mi loĝos tie (Hotel Niedersächsischer Hof) dum la unua semajno de septembro. Volonte mi interrilatos kun samideanoj. Prof. Elio Migliorini, Via Vitelleschi 26, Roma.

**Nova metodo por varbado.** Ne refuteblaj argumentaj. Posta seniluziigo maleblas. Broŝureto 5 resp. kup. Esperanto-propagando, Lund, 212, Svedujo. **La nova kristaneco,** bazita je la doktrino de sciencisto kaj reformanto, E. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Lužická 21, Praha II, Ĉeĥoslovakio.

**Kio estas "dovrasoleismo"?** Doktrino antaŭvidanta finan venkon nur post esperantistiĝo de almenaŭ unu urbo per enmigrado. Celas solvi problemon de internacia mizerularo per aĉetado de domoj, kreado de peresperanta laborigo, lernejo, ktp. Unua iniciato estas inter manoj de niaj pensiuloj. D. Soleo, Esperanto-Civito, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo.

**Mi serĉas Esperantopoŝtmarkojn** el la tuta mondo, ankaŭ kontraŭ interŝanĝo. S-ro Gottlieb Gostnenr, Prinz-Eugenstrasse 86, Innsbruck, Aŭstrujo.

**Proporciismo** ne estas nova religio. Ĝi estas la sekreto malantaŭ la beleco de presita paĝo. Ĝi nun estas disponebla al multobligitaj eldonaĵoj. Petu ekzemplon kaj prezon por via eldonaĵo. Plus-5 Multobligado-Servo, 4 Queen Street, Chesterfield, Anglujo.

**Infandesegnaĵoj.** Eldonisto bezonas desegnaĵojn (nigra inko) por salutkartoj (kristnaskaj kaj sezonaj). Ĉiu infano, kies desegnaĵo estas uzata, ricevos kvanton da kartoj, presitaj kun saluto, nomo, aĝo, urbonomo de desegninto. Sendu desegnaĵojn (maksimume 12 cm × 10 cm) kun personaj detaloj al: Plus-5 Multobligado-Servo, 4 Queen Street, Chesterfield, Anglujo.

**Por niaj etuloj** mi intencas prepari libron de fabeloj kaj rakontetoj el diversaj lingvoj, krom la angla. Interesatoj, bonvolu sendi al mi vian ŝata-

tan, informante pri la lingvo, aŭtoro (se eble), tempo ktp. kiuj ĝin produktis, sed oni tre zorgu ke jam ne ekzistas kopirajto, krom en la kazo, ke la aŭtoro bonvolos doni sian permeson por ĝia reuzo, kion vi menciigu. Diru kion vi deziras kompanse, se mi povos uzi ĝin. Edwin de Kock, 391 Market Street, Ladysmith, Natal, Unio de Sud-Afriko.

**Mi deziras aĉeti** "Esperanto"-numerojn 344, 347-8, 364-7, 370-80, 386-405, 408-9, 412-3, 415-23, 426-31, 433-85, 491, 495-506. D-ro W. Lippmann, Hamburg, Grillparzerstr. 4, Germanujo.

**Harabaĝiu Ĝigi Ghizela,** Bukureŝti, Rumanujo, petas pardonon de siaj gekorespondantoj pro la fakto ke lasttempe ŝi ne respondis akurate: Provizora adreso ĉe s-ino Edith Henique, 39, avenue Kléber, Parizo 16-e, Francujo. Respondo garantiata.

**S-ro Joseph Hegedus,** 21, Highbury, Newcastle 2. Anglujo, petas la legantojn de la gazeto sendi al li belan koloran bildkarton (pejzaĝon) kun kelkaj skribinioj.

**S-ano L. Yates** deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj ilustritajn poŝtmarkojn kaj ilustritajn poŝtkartojn, kun la tuta mondo. L. Yates, 33, Pine Avenue, Flat 5, Elwood, Melbourne, Aŭstralio.

**Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn** S-ro Alfred Mayer, Zeppelinstr. 35, (17a) Karlsruhe, Germanujo.

**Deziras interŝanĝi** uzitajn kaj neuzitajn poŝtmarkojn; unuataĝajn kovertojn. Ĉiam validas: Clemente Castells San Alejandro, 18, Barcelona-16, kaj Francisko Ramírez-Avda. Meridina, 175-2º, Barcelona-13, Hispanujo.

**István Pintér,** Komáromi 32, Gyula, Hungario, deziras korespondi kun ĉ.l.; interŝanĝas laŭ deziroj; nepre respondas.

**Pentristoj, artgrafikistoj kaj gravuristoj** el ĉiuj nacioj, kiuj interesiĝas pri esotera arto, celantaj esprimi per ĉiuj liberaj formoj la emociojn naskiĝantajn el la intuicio, aŭ el la rilatoj kun la supersentebla realeco, estas invitataj sin turni al la organiza Centro ĉe la pentristo Prof. Eupremio Lo Martire, Via Principe Amedeo, 20, Torino (Italujo).

**Kuracistoj, flegistinoj kaj laboristoj** ĉe Fervoja Ministerio deziras korespondi kun samfakaj geprofesiuloj. Skribu al Neli Ĉenova, Goĉo Gopin 15, Sofia, Bulgarujo.

**Esperanto preskaŭ mortis** en Ostendo, Dunkerko, Kalezo, Dovro, Folkstono — kaj Bulonjo-sur-Marco! Helpu ne per stulta eksmodiĝinta propagando, sed simple per ofta intervizado kaj amasrestado en tiuj centroj. Esperanto-Civito, Dovro, ĉiam je dispono senpage!

**Grava hispana revuo** pri modernaj konstruaĵoj deziras akiri fotojn kaj artikolojn pri nova arkitekturo. Rekompencos laŭdezire. Respondo garantiata. S-ro Johano Farré Sierra, Ronda General Mitre, 107, Barcelona 6, Hispanujo.



# DANA ANTOLOGIO

**ĵus aperis**

**Impona verko, kiu donas bonegan superri-  
gardon pri la dana literaturo**

260 paĝoj

38 ilustraĵoj pri la aŭtoroj

Ciu esperantisto devas posedi ĝin !

Prezo : 11.— gld bindita

8,50 gld broŝurita

Eldono : Centra Dana Esperantista Ligo  
Mendu ĉe U.E.A.

# MALSATA ŜTONO

Kolekto da rakontoj

de

**Rabindranath Tagore**

Tradukis el la bengala lingvo  
Lakshmiswar Sinha

Aperis ĉe

**ELDONA SOCIETO ESPERANTO**

Fack 7043,

MALMÖ 7,

Svedujo

kiel libro n-ro 1 en la  
Serio Oriento — Okcidento  
sub aŭspicioj de U.E.A.

Prezo : broŝ. gld. 8.50, bind. gld. 11.50  
Mendu ĉe UEA

## FERMENTARIO

**GRAVA VERKO DE UNIVERSALA VALORO**  
unu el la ĉefaj de la urugvaja pensulo  
D-ro CARLOS VAZ FERREIRA

El la hispana lingvo tradukita de Prof. Manuel  
Fernández Menéndez kaj reviziita de  
Akademiano D-ro L. C. Porto Carreiro Neto kaj  
Prof. Ismael Braga.

Aldone biografio kaj portreto de la aŭtoro kaj  
antaŭparolo kaj glosareto de la tradukinto.

Volumo : formato 21 × 15; 264 paĝoj; bona papero;  
bone bindita per kartoneto kun bela kovrildesegno.

Jen kelkaj juĝoj aperintaj en la esperanta gazetaro:  
"FERMENTARIO'n oni povas rangigi inter la plej  
 eminentajn verkojn de la mondliteraturo. Certe ĉiu  
esperantisto fieros posedi kaj ofte retralegi tiun  
majstroverkon". (Koopervativismo, Aŭg. 1960).

"Libro rekomendinda al seriozuloj kaj ŝatantoj de  
bona literaturo". (Revue Française d'Esperanto,  
Nov. 1960).

"Se Esperanto estas vere elitmovado, multaj studos  
la verkon de la granda urugvaja veremulo".  
(F. Szilagyi en Norda Prismo, N-ro 1.— 1961).

"Ni rekomendas la legadon al ĉiuj filozofemaj  
kamaradoj, al ĉiuj, kiuj serĉas ian "substancan"  
legajon". (N.B. en Sennaciulo, Nov. 1960).

"La verko estas skribita en tre bona kaj klara  
stilo, kaj ankaŭ la traduko estas bonega. Ĝi estas  
vere leginda, neniam laciga". (D-ro A. B. en Inter-  
lingvistika Informa Servo, Mart. 1961).

Prezo US \$ 2.00 (du dolaroj) aŭfrankite

La libron liveras UEA, la diversaj libroservoj  
kaj la eldoninto

**URUGVAJA ESPERANTO-SOCIETO**  
Calle Yaguarón 1397 - MONTEVIDEO (URUGVAJO)

## ENTREPRENO DE EKSPORTO

### KAJ IMPORTO

Eksporto de argentinaj produktoj

Importo de feraĵoj kaj maŝinoj

serĉas kontakton kun interesatoj

Korespondas esperante kaj hispane

**LUIS VICINO**

Casilla de Correo 2272

**BUENOS AIRES**

Argentino



Unua kaj unika libro pri fiŝoj en Esperantujo

## Sekretoj de la Marestaĵoj

de Petar Giunio  
reverkita de Lic. Marinko Ĝivoje  
eldonita sub aŭspicioj de UEA

Prezo : 5.— gld., 20 steloj.

El ĉiuj landoj kiuj povas pagi al Okcident-Eŭropo  
mendu pogrande kaj podetale ĉe U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

Moderna lernolibro de Esperanto

*por la tuta mondo*

Vilho Setälä :

## Privilegia Vojo

al lingvoscio : Esperanto

Kun instrukcioj en multaj naciaj lingvoj

Prezo 10 steloj + sendkosto

Kuneldoninto por la landoj ekster Finnlando kaj  
Svedujo : U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam.

### 3 denaskaj esperantistoj

(10, 8, 4-jaraj) okazigos naskiĝotagan leterfeston la  
15-an de septembro. Alskribaĵoj estos filatele aran-  
ĝitaj por demonstrado ĉe ludokameradoj, en lernejo  
ktp. Ĉiu alskribinto ricevos raporteton.

Peter, Ole kaj Henrik Schleicher, Ved Bellahøj 30  
B, 7., Kopenhago, Brh., Danlando. (Reprezo petata).

### „LA ĜUSTA VOJO”

Bonstila du-monata revuo por kat. esperantistoj :  
100 malsamaj n-roj haveblaj por 30 M aŭ 7,5 \$

Jarabono: 3 M. Mendu ĉe Maria Schöttl, München 19  
Schulstr. 26/I. Germanujo. (Poŝtĉek. München 57880)

## VIZITU LA FAMAN MARURBON SANREMO

sur la "RIVIERO DE LA FLOROJ" — Golfo de Ĝenova

Partoprenu en tiu Urbo, de 23a ĝis la 28-a sept. 1961 la 32an ITALAN NACIAN KONGRESON DE ESPERANTO



Aliĝoj kaj bondeziroj al : ESPERANTO-KONGRESO ĉe A.A.S.T. — SANREMO (Italio)

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam.